

BIBLIOTEKO
TUTMONDA

No 1

PROSPER MÉRIMÉE
Mateo Falcone
kaj aliaj rakontoj

RUDOLF MOSSE
ESPERANTO-FAKO

No. 1

Mateo Falcone

kaj aliaj rakontoj

J. BOREL



RUDOLF MOSSE / BERLIN
ESPERANTO-FAKO

647191




Alle Rechte vorbehalten
Ĉiuj rajtoj estas rezervitaj

Copyright 1926
by Rudolf Mosse, Berlin

821.133.1-311.2

En h a v o :

	paĝo
Prosper Mérimée (Antaŭparolo) . . .	5
Mateo Falcone	7
La Sieĝo de La Rochelle	25
La Konkero de la Reduto	37
Letero pri Virbovaj Bataloj	45



Prosper Mérimée

Prosper Mérimée

Prosper Mérimée naskiĝis en Paris en la jaro 1803a kaj mortis en 1870 en Cannes. Li ne estis profesia literaturisto, sed sinsekve ŝtata administranto, kabinetestro de la ĉefministro por eksteraj aferoj, inspektoro de la historiaj monumentoj; poste li fariĝis ano de la franca Akademio. Kvankam li skribis nur kvazaŭ amatore, li jam de sia juneco akiris famon per sia literatura talento.

Liaj verkoj pri tre diversaj temoj estas rimarkindaj pro la stila pureco kaj la precizeco kunigitaj kun neordinara priskribista ĉarmo.

Apenaŭ dudek-du-jara, li jam publikigis "Teatron de Clara Gazul" kaj serion da noveloj kaj rakontoj, kiuj precipe famigis lin, nome "Colomba" kaj "Mateo Falcone". Kiel art-specialisto li skribis la verkojn "Arkeologia vojaĝo en Francando kaj Korsiko" kaj "Provo pri la arkitekturo de la Mezepoko". Kiel historiisto li verkis interalie "Kronikon de la regno de Karlo IXa". Multe vojaĝinte, li sendis rimarkindajn leterojn kun priskriboj kaj rakontoj al "La Revue de Paris" kaj "La Revue des deux Mondes".

Tre konata verko de li estas ankaŭ "Carmen", kiu jam estas Esperantigita kaj fariĝis la temo de la samtitola, fame konata opero de Bizet.

Ne malgrave oni diras, ke Mérimée estis en Francando la unua novelverkisto de la dekaŭa jarcento. Lia influo igis sin sentebla ankaŭ en aliaj

landoj. Parolante nur pri Germanujo, ni rememorigu, ke la poezio de Chamisso forte inspiriĝis de ĝi. Lia "Mateo Falcone der Corse" estas preskaŭ nura imito de la franca originalo.

Goethe ankaŭ ŝatis la skribmanieron de Mérimée, al kiu li aljuĝis unuan rangon inter la tiutempaj romanverkistoj pro lia objektiveco kaj senafekta vereco en priskriboj.

La ĉi tie sekvantaj kvar literaturaj pecetoj de Mérimée trafe ilustras la multflankecon de lia talento.

En "Mateo Falcone" ni vidas la noveliston, kiu konigas al ni la karakterojn kaj morojn de Korsikanoj.

En "La Sieĝo de La Rochelle" kaj "La Konkero de la Reduto" ni trovas la historiiston. La unua rakonto estas la nepre objektiva raporto de historia observanto pri unu el la plej famaj faktoj en la abomena proreigia milito de 1572; la dua estas pli psike-analiza pri la sentoj de juna oficiro en unua batalo.

En la letero el Madrid pri "Virbovaj Bataloj" li mirige reliefas sian priskriban talenton kaj vivigas antaŭ la okuloj de la leganto la plej karakterizan trajton de la hispanaj moroj per pripentrado, kiu ankoraŭ nun, post unu jarcento, restas vera ĝis la malgrandaj detaloj.

En tiuj verkoj oni legos pri teruraĵoj, mortigoj, sangelverŝoj kaj juĝos laŭ tio pri la temoj prefere elektitaj de la aŭtoro. Sed ni rimarkigu, ke lia celo ne estis terurigi nek veki malsanajn emociojn, sed nur prezenti la faktojn objektive, ne enmetante en ilin iun pasian intencon. Kaj tion oni sentas, legante liajn verkojn.

Goethe diris al Eckermann: "Mérimée estas vere sperta kaj lerta homo (germ. *ein ganzer Kerl*!), ĉar entute objektiva pritraktado de iu temo necesigas pli da forto kaj genio, ol oni kredas."

Recco, en Januaro 1925.

La Tradukinto

Mateo Falcone¹⁾

1829

Elirante el Porto-Vecchio¹⁾ kaj turnante sin al nord-oriento kontraŭ la interno de l' insulo²⁾, oni vidas, ke la tereno rapide leviĝas, kaj post trihora irado sur malrektaj vojetoj, obstrukciitaj de grandaj rokpecoj kaj ofte tranĉitaj de krutaĵoj, oni troviĝas sur la rando de tre vasta makiso³⁾.

La makiso estas patrujo de la korsikaj paŝtistoj kaj de ĉiuj homoj, kiuj malpaciĝis kun la juĝistaro.

Oni sciu, ke la korsika kampulo, por ŝpari al si la penon sterki sian kampon, ekbruligas parton de arbaro, ne havante zorgon pri tio, ĉu la fajro etendiĝos pli malproksimen ol estus necese. Okazu, kio povas! Oni estas certa, fari bonan rikolton, semante en tiun teron, fruktigitan per la cindro de la tie kreskintaj arboj. Post forpreno de la spikoj — ĉar oni lasas la pajlon, kies tranĉado estus tro laciga —

1) Elparolu "Falkone" kaj "Porto-Vekko".

2) La insulo Korsiko.

3) France "makis" aŭ "maquis" (elp. "maki"), nomo donita en Korsiko al senkulturaj terenoj, kovrataj de densaj arbetoj kaj dornajaroj, kiuj estas plej ofte la rifuĝejo de banditoj. (Noto de la tradukinto.)

la en la tero restintaj, ne bruliĝintaj radikoj kreskas dum la printempo, formante dikajn trunkarojn, kiuj post malmultaj jaroj atingas altecon de sep aŭ ok futoj. Estas tiu speco de densejo, kiun oni nomas makiso. Ĝi konsistas el malsimilaj, diversspecaj arboj kaj arbetoj, konfuzo miksitaj, kiel plaĉas al Dio.

Nur per hakilo oni povus tratanĉi al si vojon tie en certaj partoj, kaj oni vidas makisojn tiel dikajn, ke eĉ la sovaĝaj ŝafoj ne kapablas enpenetri.

Se vi mortigis homon, iru en la makison de Porto-Vecchio, kaj tie vi vivos sendanĝere kun bona pafilo, pulvo kaj kugloj; ne forgesu brunan mantelon kun kapuĉo (pilone), por uzi ĝin kiel kovrilon kaj kontraŭon. La paŝtistoj donos al vi lakton, fromaĝon kaj kaŝtanojn, kaj vi ne bezonos timi ion flanke de la juĝistaro aŭ de la parencoj de l' mortinto, escepte kiam vi devos malsupreniri en la urbon por rekompletigi vian municion.

Kiam mi estis en Korsiko en 18... , Mateo Falcone havis sian domon je duona mejlo de tiu makiso. Li estis homo sufiĉe riĉa por tiu lando; li vivis noble (kio signifas: farante nenion) per la produkto de siaj brutaroj, kiujn speco de migrantaj paŝtistoj kondukis tien kaj tien sur la montoj.

Kiam mi vidis lin du jarojn post la okazintaĵo, kiun mi nun rakontos, li ŝajnis al mi esti kvindekjara maksimume. Imagu viron malgrandan, sed fortikan, kun krispa hararo, nigra kiel gagato, kun agleca nazo, maldikaj lipoj, grandaj vivecaj okuloj kaj kun vizaĝkoloro kiel interna botledo. Lia pafista lerteco estis konata kiel neordinara, eĉ en lia regiono,

kie ekzistas tiom da bonaj pafistoj. Mateo ekzemple neniam estus pafinta sur sovaĝan ŝafon per kugletoj, sed en distanco de cent dudek paŝoj li faligis ĝin per kuglo, celinte al la kapo aŭ al la ŝultro laŭvole. Nokte li uzis siajn pafilojn tiel lerte kiel dum la tago, kaj oni citis al mi fakton, kiu povas ŝajni nekredebla al iu, kiu neniam vojaĝis en Korsiko:

Je okdek paŝoj oni metis ekbruligitan kandelon post diafanan paperon larĝan kiel telerplato. Li celis kaj restigis la pafilon ĉe la vango, oni estingis la kandelon, kaj post unu minuto, en plena senlumeco, li pafis kaj traboris la paperon tri fojojn el kvar pafoj.

Per tiel bonega kapableco Mateo Falcone estis akirinta al si grandan famon. Oni ŝatis lin same kiel bonan amikon kaj kiel danĝeran malamikon. Cetere li estis servema kaj almozdona kaj vivadis paceme kun ĉiuj en la distrikto de Porto-Vecchio. Sed oni rakontis pri li, ke en Corte⁴⁾, kie li trovis sian edzinon, li laŭ fortega maniero liberigis sin de amkonkuranto, kiun oni rigardis timinda tiel en milito kiel en amaferoj. Almenaŭ oni atribuis al Mateo certan pafon, kiu surprizis tiun konkuranton, dum li razis sin antaŭ speguleto pendants ĉe lia fenestro. Post silentiĝo de la afero, Mateo edziĝis. Lia edzino unue donacis al li tri filinojn (pro kio li furiozis) kaj fine filon, kiun li nomis Fortunato: tiu estis la espero de sia familio, la heredonto de l' nomo. La filinoj bone edziniĝis; ilia patro en okazo de bezono povis fidi al la ponardoj kaj kara-

⁴⁾ Elp. "Korte"; urbo en centra Korsiko. (La tradukinto.)

benoj de siaj bofiloj. La filo estis nur dek-jara, sed li jam antaŭvidigis feliĉigajn inklinojn.

Iun aŭtunan tagon Mateo eliris frumatene kun sia edzino, por viziti unu el siaj brutaroj en herba maldensejo de la makiso. La malgranda Fortunato volis akompani ilin, sed la herbejo estis tro malproksima. Cetere iu devis resti por gardi la domon; la patro rifuzis kunirigi lin. Ni vidos, ĉu li ne havis kaŭzon por penti tion.

Li jam forestis de antaŭ kelkaj horoj, kaj Fortunato estis trankvile kuŝanta sub la suno, rigardante la blujn montojn kaj pensante, ke la venontan dimanĉon li iros en la urbon por tagmanĝi ĉe sia onklo la kaporalo⁵⁾, kiam liaj meditadoj subite estis interrompataj per eksplodo de iu pafilo. Li levigis kaj rigardis al la ebenaĵo, de kie venis la bruoj. Aliaj pafoj sekvis laŭ regulaj intertempoj kaj ĉiam pli proksimaj; fine sur la vojeto, kiu kondukis de la ebenaĵo al la domo de Mateo, aperis viro kun pinta ĉapo, kian surmetas la montanoj, barbohava, vestita per ĉifonaĵoj, ŝovante sin penegante antaŭen kaj apogante sin sur sia pafilo. Li estis ĵus ricevinta pafon en la femuron.

Tiu viro estis bandito⁶⁾, kiu, foririnte por aĉeti pulvon en la urbo, survoje falis en embuskon de korsikaj ĝendarmoj⁷⁾. Post energia defendo li estis sukcesinta forkuri, senhalte persekutate kaj pafante,

⁵⁾ La korsikaj kaporaloj ne estas suboficioj, sed ŝatata klaso de ĉefoj aŭ vilaĝestroj. (La tradukinto.)

⁶⁾ Tie ĉi la vorto estas samsignifa kiel forpelito. (Noto de la tradukinto.)

⁷⁾ "Voltigeurs", policanaro kreita de la registaro kaj kunaganta kun la ĝendarmaro. (Noto de la aŭtoro.)

de unu roko al alia. Sed li gajnis malmultan spacon antaŭ la soldatoj, kaj lia vundo malhelpis lin, alveni en makiso, antaŭ ol li estis atingita.

Li alproksimiĝis al Fortunato kaj diris:

— Vi estas la filo de Mateo Falcone?

— Jes.

— Mi estas Gianetto Sanpiero. Mi estas persekutata de la flav-kolumuloj⁸⁾. Kaŝu min, ĉar mi ne plu povas forkuri.

— Kaj kion diros mia patro, se mi kaŝos vin sen lia permeso?

— Li diros, ke vi estas prava.

— Kiu scias?

— Tuj kaŝu min; ili venas.

— Atendu, ĝis mia patro revenos.

— Mi atendu! Malbeno! Post kvin minutoj ili estos tie ĉi. Nu, kaŝu min, aŭ mi vin mortigos.

Fortunato respondis kun perfekta sinregado:

— Via pafilo estas malŝargita, kaj vi ne plu havas kartoĉojn en via zonumo.

— Mi havas mian ponardeton.

— Sed ĉu vi kuros tiel rapide kiel mi? Li faris salton kaj metis sin for de lia kaptopovo.

— Vi ne estas la filo de Mateo Falcone! Ĉu vi lasos min esti arestata antaŭ via domo?

La infano ŝajnis tuŝita.

— Kion vi donos al mi, se mi vin kaŝas? — li diris alproksimiĝante.

La bandito serĉis en leda saketo, kiu pendis de lia zonumo, kaj eltiris moneron de kvin frankoj, kiun

⁸⁾ La uniformo de la "voltigeurs" estis tiam bruna kun flava kolumo. (Noto de la aŭtoro.)

li estis gardinta kredeble por aĉeti pulvon. Fortunato ridetis, vidante la arĝentan moneron. Li prenis ĝin kaj diris al Ĝianetto: — Ne timu!

Tuj li faris grandan truon en fojnamaso staranta apud la domo. Ĝianetto enŝoviĝis, kaj la infano surkovris lin tiamaniere, ke restu al li sufiĉe da aero por spiri, sed ke nenio suspektigu, ke tiu fojno kaŝas viron. Krome li uzis ruzajon de sovaĝo, lerte elpensitan. Li iris por preni katinon kun ŝiaj idetoj kaj ennestigis ilin sur la fojnamaso por igi kredi, ke oni ne ektuŝis ĝin antaŭ ne longe. Poste rimarkinte la sangajn postsignojn sur la vojeto apud la domo, li kovris ilin zorgeme per polvo kaj rekuŝiĝis en la sunbrilo kun perfekta trankvilo.

Kelkajn minutojn poste ses viroj en uniformo bruna kun flava kolumo, komandataj de adjutanto, alvenis antaŭ la pordo de Mateo. Tiu adjutanto estis iom parenca al Falcone. (Oni scias, ke en Korsiko la parencaj gradoj estas rememorataj multe pli malproksime ol aliloke.) Li nomiĝis Tiodoro Gamba kaj estis viro agema, timegata de la banditoj, el kiuj li jam kaptis plurajn.

— Bonan tagon, kuzeto, — li diris al Fortunato alproksimiĝante, — kiel vi jam pligrandiĝis! Ĉu vi vidis viron preterpasantan antaŭ ne longe?

— Ho, mi ankoraŭ ne estas tiel granda kiel vi, kuzo mia, — respondis la infano kun malsprita rigardo.

— Tio certe venos. Sed diru, ĉu vi eble vidis viron preterpasantan?

— Ĉu mi vidis viron preterpasantan?

— Jes, viron kun pinta ĉapo el nigra veluro kaj kun jako brodita ruĝe kaj flave?

— Viron kun pinta ĉapo kaj jako brodita ruĝe kaj flave?

— Jes, respondu tuj kaj ne ripetu miajn demandojn.

— Hodiaŭ matene la sinjoro pastro pasis preter nia pordo sur sia ĉevalo Piero. Li demandis min, kiel fartas paĉjo, kaj mi respondis . . .

— Ha, sentaŭguleto, vi estas ruzeta! Diru tuj, kien iris Ĝianetto, ĉar lin ni serĉas; kaj li venis sur tiu ĉi vojo, mi estas certa pri tio.

— Kiu scias?

— Kiu scias? Mi mem scias, ke vi vidis lin.

— Ĉu oni vidas la preterpasantojn, kiam oni dormas?

— Vi ne dormis, fripono, la pafoj vin vekis.

— Vi kredas, mia kuzo, ke viaj pafiloj tiel bruas. La karabeno de mia patro bruas multe pli forte.

— La diablo vin prenu! Malbenita bubo! Mi estas tute certa, ke vi vidis Ĝianetto-n. Eble vi eĉ kaŝis lin. Nu, kamaradoj, eniru en tiun domon kaj vidu, ĉu nia viro estas tie. Li marŝadis nur sur unu piedo, kaj la fripono estas tro inteligenta por lamante eniĝi en la makison. Cetere la sangaj postsignoj haltas ĉi tie.

— Kaj kion diros paĉjo? — rikane demandis Fortunato, — kion li diros, se li ekscios, ke oni eniris en la domon dum lia foresto?

— Sentaŭgulo! — diris la adjutanto Gamba, prenante lin ĉe la orelo, — ĉu vi scias, ke mi povas igi vin, ŝanĝi vian parolmanieron? Eble ricevinte dudekon da batoj per la glavo, vi fine parolos.

Sed Fortunato ĉiam mokridadis.

— Mia patro estas Mateo Falcone, — li diris emfaze.

— Ĉu vi scias, bubaĉo, ke mi povas vin kunpreni al Corte aŭ al Bastia? Mi igos vin kuŝi sur pajlo en karceron, kun katenitaj piedoj, kaj mi igos vin senkapigi, se vi ne diras, kie estas Gianetto Sanpiero.

La infano ekridegis, aŭdante tiun ridindan minacon. Li ripetis: — Mia patro estas Mateo Falcone!

— Adjutanto, — diris mallaŭte unu el la soldatoj, — ni ne malpacigu kun Mateo.

Gamba videble estis embarasita. Li parolis malaltvoĉe kun siaj soldatoj, kiuj jam estis esplorintaj la tutan domon. Tio ja ne estis tre longedaŭra laboro, ĉar la kabano de Korsikano konsistas nur el unu kvarangula ĉambro. La meblaro estas kunmetita el tablo, benkoj, kofroj kaj iloj por ĉaso kaj mastrumado. Dume la malgranda Fortunato karesadis sian katinon kaj ŝajne malice ĝojis pri la konfuzo de la soldatoj kaj de sia kuzo.

Soldato alproksimiĝis al la fojnamaso. Li vidis la katinon kaj malzorge enplantis la bajoneton en la fojnon, levante la ŝultrojn, kvazaŭ li sentus, ke lia singardo estas absurda. Nenio moviĝis, kaj la vizaĝo de la infano ne perfidis la plej etan emocion.

La adjutanto kaj lia anareto "fordonis sin al la diablo". Ili jam serioze rigardis flanken de la ebenaĵo, kvazaŭ ili inklinus reiri la vojon, sur kiu ili venis, kiam ilia estro, konvinkita pri tio, ke la minacoj havos nenian efikon ĉe la fileto de Falcone, volis fari novan klopodon kaj elprovi la influon de karesoj kaj donacoj.

— Kuzeto, — li diris, — vi ŝajne estas vigla kuragulo. Vi sukcesos en la mondo. Sed vi faras malbelan ludon kun mi, kaj se mi ne timus ĉagreni mian kuzon Mateo — je diablo! — mi forportus vin kun mi.

— Nu, nu!

— Sed kiam mia kuzo revenos, mi rakontos al li la aferon, kaj por puni vin pro via mensogo, li vupos vin ĝis sangofluo.

— Ĉu vi kredas?

— Vi ja vidos... sed jen, estu brava knabo, kaj mi donacos ion al vi.

— Kaj mi, kuzo mia, donacos al vi konsilon: se vi pli multe prokrastiĝas, Gianetto estos en la makiso, kaj tiam vi bezonos pli ol unu viglulon, kia vi estas, por trovi lin.

La adjutanto tiris el sia poŝo arĝentan horloĝon, kiu valoris minimume dek skudojn⁹⁾, kaj rimarkante, ke la okuloj de Fortunato brilegis, rigardante ĝin, li diris, dum li tenis la horloĝon pendantan de la ŝtala ĉeno:

— Fripono, vi volonte havus horloĝon, kia estas tiu ĉi, pendantan de via kolo, kaj vi promenus en la stratoj de Porto-Vecchio fiere kiel pavo, kaj la homoj demandus vin: Kioma horo estas? Kaj vi respondus: Vidu sur mian horloĝon!

— Kiam mi estos granda, mia onklo la kaporalo donacos al mi horloĝon.

— Jes, sed la filo de via onklo jam havas horloĝon... ne tiel belan, kia estas tiu ĉi, vere... Sed li estas pli juna ol vi.

⁹⁾ France "écu", itale "scudo", hispane "escudo" = arĝenta monero de 5 frankoj. (La tradukinto.)

La infano ekĝemis.

— Nu, ĉu vi ĝin volas havi, kuzeto, tiun ĉi horloĝon?

Fortunato, ĵetante flankan rigardeton al la horloĝo, similis al kato, al kiu oni prezentas tutan kokidon. Ĉar ĝi sentas, ke oni mokas pri ĝi, ĝi ne kuraĝas etendi la ungetojn, kaj de tempo al tempo ĝi deturnas la okulojn por ne riski, esti venkata de la tento; sed ĝi lekas siajn lipetojn ĉiumomente, kvazaŭ dirante al sia majstro: Kiel kruela estas via ŝerco!

Sed la adjutanto Gamba ŝajne estis serioza, prezentante la horloĝon. Fortunato ne etendis la manon, sed li diris kun maldolĉa rideto: — Kial vi mokas pri mi?

— Je Dio, mi ne mokas. Diru nur, kie estas Gianetto, kaj tiu ĉi horloĝo estas via.

Fortunato vidigis malkredeman rideton, kaj fiksante siajn nigrajn okulojn en tiujn de l' adjutanto, li klopodis legi en ili, kian fidon li povas havi al liaj paroloj.

— Ke mi perdu mian epoleton, — ekkriis la adjutanto, — se mi ne donas al vi la horloĝon sub tiu kondiĉo! La kamaradoj estas atestantoj, kaj mi ne povas repreni mian vorton.

Tiel parolante, li ĉiam alproksimigis la horloĝon tiom, ke ĝi preskaŭ tuŝis la palan vangon de l' infano. Tiu ĉi bone montris sur sia vizaĝo la batalon, kiu regis en sia animo inter la tento kaj la respekto ŝuldata al la gastamo. Lia nuda brusto leviĝadis forte, kaj li preskaŭ sufokiĝis. Dume la horloĝo balanciĝis, turniĝis kaj eĉ ektuŝis la pinton de lia

nazo. Fine, iom post iom, lia dekstra mano leviĝis al la horloĝo, la fingropintoj ĝin ekpalpis, kaj ĝi pezis tute en lia mano; sed la adjutanto ankoraŭ ne ellasis la ĉenfinon... La ciferplato estis lazura... la ujo freŝe purigita... en la sunbrilo ĝi aspektis kiel fajro... La tento estis tro forta.


Fortunato levis ankaŭ la maldekstran manon kaj per la dika fingro montris super sia ŝultro la fojnamason, al kiu li apogis sin. La adjutanto tuj komprenis; li ellasis la ĉenon. Fortunato sentis sin sola posedanto de la horloĝo. Li leviĝis kun lerteco de cervo kaj malproksimiĝis dek paŝojn de la fojnamaso, kiun la soldatoj komencis disjeti.

Baldaŭ oni vidis movadon en la fojno kaj eliranta el ĝi viron sangomakulitan kun ponardo en la mano; sed kiam li penadis ekstari sur la piedoj, lia malvarmiĝinta vundo ne permesis al li, resti staranta. Li falis. La adjutanto saltis al li kaj elŝiris el lia mano la ponardon. Tuj oni lin forte ligis, malgraŭ lia kontraŭstaro.

Gianetto, kuŝanta sur la tero kaj ligita kiel branĉofasko, turnis la kapon kontraŭ Fortunato, kiu estis alpaŝinta pli proksime. — Filo de...! — li diris kun pli da malŝato ol da kolero.

La infano ĵetis al li la arĝentan moneron, kiun li estis ricevinta de li, sentante, ke li ne plu meritas ĝin; sed la bandito ŝajne ne rimarkis tiun agon. Li diris kun granda sinregado al la adjutanto: — Mia kara Gamba, mi ne povas marŝi, kaj vi devos min porti al la urbo.

— Vi ĵus kuris pli rapide ol kapreolo, respondis la kruela venkinto, — sed estu trankvila, mi tiel



ĝojas teni vin, ke mi portus vin tutan mejlon sur mia dorso, ne sentante lacecon. Cetere, kamaradoj, ni tuj faros portilon el branĉoj kaj via kapoto. En la farmdomo de Crespoli ni trovos ĉevalojn.

— Bone, — diris la malliberigito, — metu ankaŭ iomon da pajo sur vian portilon, por ke mi kuŝu pli komforte.

Dum la soldatoj estis okupataj — unuj farante specon de homportilo el branĉoj de kaŝtanujo, aliaj bandaĝante la vundojn de Ĝianetto, Mateo Falcone kaj lia edzino subite aperis en kurbigo de vojeto, kiu kondukis al la makiso. La virino marŝis penege, klinita sub la pezo de grandega sako kun kaŝtanoj, dum ŝia edzo fiere paŝadis, portante nur pafilon en la mano kaj alian ŝultrozone; ĉar ne decas al viro, porti alian ŝargon ol batalilon.

Vidante la soldatojn, Mateo unue pensis, ke ili venis por lin aresti. Sed kial tia penso? Ĉu Mateo havis ian malpacon kun la polico? Ne. Li ĝuadis bonan reputacion. Li estis, kiel oni diras, “bonfama privatulo”; sed li estis Korsikano kaj montano, kaj malmultaj korsikaj montanoj, serĉante bone en sia memoro, ne trovas iun peketon, ekzemple vundigon per pafado aŭ ponardo, aŭ alian similan malgravaĵon. Mateo pli ol iu alia havis puran konsciencon, ĉar de pli ol dek jaroj li ne estis turninta sian pafilon al homo. Tamen li estis singardema kaj pretigis sin por bela defendobatalo, se estos necese.

— Edzino, — li diris, — lasu vian sakon kaj estu preta! — Ĝi tuj obeis. Li donis al ŝi la pafilon, kiun li portis ŝultrozone kaj kiu povus lin malhelpi. Li streĉis la ĉanon de tiu, kiun li portis en mano, kaj

malrapide antaŭeniris kontraŭ la domo, laŭlonge de la arboj, kiuj borderis la vojon. Li estis preta, por en okazo de plej malgranda neamika kontraŭago ĵeti sin post dikan trunkon, de kie li povus pafi sendanĝere. Lia edzino sekvis lin tute proksime, tenante la duan ŝargitan pafilon kaj la kartoĉujon. La tasko de bona dommastrino dum batalo estas, ŝargi la pafilojn por la edzo.

Siaflanke la adjutanto estis tre malkvieta, vidante, ke Mateo alproksimiĝas per malrapidaj paŝoj, kun la batalilo en mano kaj fingro sur la ĉano. Eble, pensis li, se Mateo estas parenco de Ĝianetto aŭ lia amiko kaj volas lin defendi, la kugloj el liaj du pafiloj alvenos al du el ni tiel certe, kiel letero en poŝto, kaj se li celus al mi, malgraŭ la parenceco...

En tia embaraso li ekkaptis tre kuraĝan decidon. Li antaŭeniris kontraŭ Mateo por klarigi la aferon, alparolante lin kiel malnovan konaton; sed la mal-longa interspaco, kiu lin apartigis de Mateo, ŝajnis al li terure longa.

— He! saluton! amiko mia, — li kriis, — kiel vi fartas, bravulo? Estas mi, Gamba, via kuzo.

Mateo, ne respondante vorton, haltis, kaj dum la alia parolis, li malrapide levis la pafiltubon tiel, ke ĝi estis turnata al la ĉielo, kiam la adjutanto lin renkontis.

— Bonan tagon, frato¹⁰), — diris la adjutanto, etendante la manon, — de longe mi ne vidis vin.

— Bonan tagon, frato!

¹⁰) “Buon giorno, fratello!”; kutima saluto de la Korsikanoj (Noto de la tradukinto.)

— Mi venis por saluti vin pasante, kaj mian kuzinon Pepa. Ni iris longan vojon hodiaŭ, sed ni ne plendu pri laceco, ĉar ni faris bonegan kapton. Ni ĵus arestis la banditon Gianetto Sanpiero.

— Dio estu benata! — ekkriis Giuseppa. — Li ŝtelis de ni lakto-kaprinon en la pasinta semajno.

Tiuj paroloj ĝojigis Gamba-n.

— Kompatindulo! — diris Mateo, — li estis malsata.

— La fripono sin defendis kiel leono, — daŭrigis la adjutanto iomete honta, — li mortigis unu el miaj soldatoj kaj krom tio rompis brakon de kaporalo Chardon; sed tio ne estas grava, li ja estas nur Franco... Poste li tiel bone kaŝis sin, ke la diablo ne estus povinta malkovri lin. Sen mia kuzeto Fortunato mi neniam estus povinta lin trovi.

— Fortunato! — ekkriis Mateo.

— Fortunato! — ripetis Giuseppa.

— Jes, Gianetto estis kaŝinta sin sub tiu fojn-amaso, sed mia kuzeto montris al mi la kaŝejon. Mi diros tion ankaŭ al lia onklo la kaporalo, por ke li sendu al li belan rekompencan por lia peno. Kaj lia nomo kaj la via estos en la raporto, kiun mi sendos al sinjoro la prokuroro.

— Malbeno! — mallaŭte diris Mateo.

Ili alvenis ĉe la taĉmento. Gianetto jam kuŝis sur la portilo, preta por foriro. Kiam li vidis Mateo-n kun Gamba, li ridetis strangamaniere, kaj turnante sin al la dompordo, li kraĉis sur la sojlon, dirante: — Domo de perfidulo!

Nur viro preta por morti povis elparoli la vorton perfidulo, aplikante ĝin al Mateo. Alie la insulto

estus tuj repagata per preciza piko de ponardo, kiu ne bezonus esti ripetata. Sed Falcone ne faris alian movon ol meti la manon al sia frunto, kiel premegata homo.

Fortunato estis enirinta en la domon, kiam lia patro alvenis. Li baldaŭ revenis kun taso da lakto, kiun li prezentis al Gianetto kun mallevitaj okuloj. — For de mi! — kriis al li la kaptito per tondra voĉo. Poste li turnis sin al unu el la soldatoj: — Kamarado, donu al mi ion por trinki, — li diris. La soldato enmanigis al li sian kukurban botelon¹¹⁾, kaj la bandito trinkis la akvon, kiun donis al li viro, kun kiu li ĵus interŝanĝis pafojn. Poste li petis, ke oni ligu liajn manojn sur la brusto anstataŭ post la dorso. — Plaĉas al mi, — li diris, — kuŝi komforte. — Tuj oni kontentigis lin, kaj la adjutanto ordonis la foriron, adiaŭis Mateo-n, kiu ne respondis, kaj mal-supreniris per rapidaj paŝoj kontraŭ la ebenajo.

Pasis pli ol dek minutoj, antaŭ ol Mateo malfermis la buŝon. La infano rigardis per malkvietaj okuloj jen la patrinon, jen la patron, kiu, apogite sur sia pafilo, rigardis lin kun esprimo de amasigita kolero.

— Vi bone komencas! — fine diris Mateo per voĉo malalta, sed teruriga por iu, kiu konis la viron.

— Patro! — ekkriis la infano, alpaŝante kun larmoj en la okuloj, kvazaŭ por fali antaŭ liajn piedojn. Sed Mateo kriis: — For de mi! — Kaj la infano haltis kaj ploregis je kelkaj paŝoj de sia patro.

¹¹⁾ Oni uzas sekigitajn kukurbojn kiel ujojn por likvidaĵoj. (Noto de la tradukinto.)

Giuseppa alproksimiĝis. Ŝi ĵus ekvidis la horloĝan ĉanon, kies fino eliris el la ĉemizo de Fortunato.

— Kiu donis al vi tiun horloĝon? — ŝi demandis per severa tono.

— Mia kuzo, la adjutanto.

Falcone kaptis la horloĝon kaj ĵetis ĝin fortege sur ŝtonon tiel, ke ĝi disrompiĝis en mil pecojn.

— Edzino, — li diris, — ĉu tiu ĉi infano estas de mi?

La brunaj vangoj de Giuseppa farigis brikruĝaj.

— Kion vi diras, Mateo? Kaj ĉu vi scias, al kiu vi parolas?

— Nu, tiu ĉi infano estas la unua el sia gento, kiu faris perfidon.

La ploreĝoj kaj singultoj de Fortunato duobligis, kaj Falcone senĉese fiksadis al li siajn akcipitrajn okulojn. Fine li frapis la teron per la kolbo de sia pafilo, kaj ĵetinte ĝin sur sian ŝultron, li ekpaŝis sur la vojo al la makiso, kriante al Fortunato, ke li sekvu lin. La infano obeis.

Giuseppa kuris post Mateo kaj ekkaptis lian brakon. — Li estas via filo, — ŝi diris per tremanta voĉo, endronigante siajn nigrajn okulojn en tiujn de la edzo, kvazaŭ por legi tion, kio okazas en lia animo.

— Lasu min, — rediris Mateo, — mi estas lia patro.

Giuseppa kisis sian filon kaj eniris plorante en la dometon. Ŝi falis surgenuie antaŭ bildo de la Virgulinino kaj preĝis fervore. Dume Falcone marŝis proksimume ducent paŝojn sur la vojeto kaj haltis nur ĉe krutfosaĵo, kie li malsupreniris. Li esploris

la teron per la pafilkolbo kaj trovis ĝin mola kaj facile fosebla. La loko ŝajnis al li konvena por lia celo.

— Fortunato, iru al tiu granda ŝtono!

La infano faris, kion li ordonis, kaj surgenuis.

— Diru viajn preĝojn!

— Ho patro, patro, ne mortigu min!

— Diru viajn preĝojn! — ripetis Mateo per terura voĉo.

Balbutante kaj ploreĝante la knabo eldiris la preĝojn "Patro nia" kaj "Credo". La patro fortavoĉe respondis "Amen" post ĉiu preĝo.

— Ĉu estas ĉiuj preĝoj, kiujn vi scias?

— Patro, mi scias ankaŭ la preĝon "Ave Maria" kaj la litanion, kiun instruis al mi mia onklino.

— Ĝi estas tre longa, sed ne estas grave.

La infano finis la litanion per malforta voĉo.

— Ĉu vi finis?

— Ho, mia patro, havu kompaton! pardonu! Mi ne plu faros tion. Mi petegas mian kuzon la kaporalon, ke oni indulgu Gianetto-n.

Dum li ankoraŭ parolis, Mateo streĉis la ĉanon de l' pafilo kaj celis al li, dirante: — Dio pardonu vin!

La knabo faris malesperan klopodon por leviĝi kaj ĉirkaŭpreni la genuojn de sia patro, sed li ne havis tempon por tio. Mateo pafis, kaj Fortunato falis mortinta.

Ne ĵetinte rigardon al la kadavro, Mateo ekpaŝis sur la vojo al sia domo por serĉi fosilon kaj enterigi sian filon. Li apenaŭ estis farinta kelkajn paŝojn, kiam li renkontis Giuseppa-n, kiu alkuris timigita de la pafado.

— Kion vi faris? — ŝi ekkriis.
— Justecon.
— Kie li estas?
— En la fosaĵo. Mi tuj enterigos lin. Li mortis kiel kristano; mi igos kanti meson por li. Oni diru al mia bofilo Tiodoro Bianchi, ke li venu por loĝi kun ni.

La Sieĝo de La Rochelle¹⁾

La Rochelle, kie preskaŭ ĉiuj loĝantoj estas anoj de la reformita religio, estis kvazaŭ ĉefurbo de la sudfrancaj provincoj kaj la plej forta bastiono de la protestanta partio. Vasta komerco kun Anglujo estis akirinta al ĝi grandajn riĉaĵojn kaj tiun spiriton sendependecan, kiun ili naskas kaj subtenas.

La burĝoj, fiŝkaptistoj aŭ maristoj, ofte Korsaroj, jam de la junaĝo kutimiĝintaj al la danĝeroj de aventura vivo, posedis energion, kiu por ili anstataŭis disciplinon kaj militkutimon.

Sekve de tio, eksciante pri la hombuĉado de la 24a de Aŭgusto 1572 (Sta. Bartolomeo) kaj malproksime sentante tiun rezignon stultan, al kiu submetiĝis la plimulto de la protestantoj kaj kiu igis ilin mal-esperi pri sia afero, la Rochelle-anoj estis plenaj de tiu agema kaj timinda kuraĝo, kiun kelkafoje donas la senespero.

Ĉiuj interkonsente decidis, prefere suferi la lastajn ekstremaĵojn, ol malfermi siajn pordegojn al malamiko, kiu ĵus donis al ili tiel neneigeblan pruvon de siaj malhonesteco kaj perfido.

¹⁾ Elp.: La Roŝél.

Dum la pastroj ekscitis tiun fervoron per siaj fanatikaj paroladoj, virinoj, infanoj kaj maljunuloj vetlaboradis por rebonigi la malnovajn fortikaĵojn kaj starigi novajn. Oni kolektis manĝaĵojn kaj batalilojn, oni ekipis barkojn kaj ŝipojn, oni ne perdis eĉ unu momenton por organizi kaj pretigi ĉiujn defendorimedojn, pri kiuj la urbo estis kapabla.

Pluraj nobeloj, saviĝintaj el la hombuĉado, aliĝis al la Rochelle-anoj, kaj per la priskriboj, kiujn ili faris pri la Sta. Bartolomeo, ili kuraĝigis la plej timemajn.

Por homoj savitaj el morto, la milito kaj ĝiaj hazardoj certe ŝajnis esti kvazaŭ malforta vento por maristoj, kiuj ĵus saviĝis el ventego. Mergy²⁾ kaj lia kunulo estis inter tiuj forkurintoj, kiuj pligrandigis la vicojn de l' defendantoj de La Rochelle.

La kortego de Paris, maltrankviligita per tiuj pretigoj, pentis pri tio, ke ĝi ne antaŭvidis ilin. Marŝalo de Biron alproksimiĝis al La Rochelle kun proponoj pri interkonsento. La reĝo havis kaŭzojn por esperi, ke la elekto al Biron estos agrabla al la Rochelle-anoj; ĉar tiu marŝalo, anstataŭ partopreni en la buĉadoj de Sta. Bartolomeo, male estis savinta plurajn eminentajn protestantojn kaj eĉ estis direktinta la kanonojn de l' arsenalo, kiun li estris por la homomortigantoj portantaj la reĝajn standardojn.

Li nur petis, esti akceptata en la urbo kaj esti rekonata kiel guberniestro por la reĝo; li promesis respekti la privilegiojn kaj liberecojn de la loĝantoj kaj lasi al ili plenan religian liberecon. Sed post la

²⁾ Elp.: Merji.

mortigado al sesdek mil protestantoj, ĉu oni ankoraŭ povis kredi la promesojn de Karlo IXa?

Cetere, eĉ dum la intertraktadoj la buĉadoj daŭris en Bordeaux³⁾; la soldatoj de Biron rabadis sur la teritorio de La Rochelle, kaj reĝa ŝiparo haltigis la komercajn ŝipojn kaj fermis la havenon.

La Rochelle-anoj rifuzis akcepti Biron-on kaj respondis, ke ili ne povos intertrakti kun la reĝo tiel longe, kiel li restos sub la potenco de la Guise-oj⁴⁾. Eble ili kredis, ke tiuj ĉi estis la solaj iniciatintoj de la malbonoj, kiujn suferis la Calvinismo; aŭ eble per tiu ofte ripetita neveraĵo ili volis trankviligi la konsciencon de tiuj, kiuj eble kredus, ke la fideleco al la reĝo devus superi la interesojn de ilia religio.

De tiam la interkonsento fariĝis neebla. La reĝo elektis alian intertraktanton kaj sendis La Noue-on⁵⁾. La Noue, nomita "Ferbrako" pro artefarita brako, per kiu li anstataŭigis tiun, kiun li perdis en batalo, estis fervora Calvinano, kiu en la lastaj burĝaj militoj pruvis grandan kuraĝon kaj militistan talenton. La admiralo, kies amiko li estis, ne havis pli sindoneman leŭtenanton. Dum la tempo de Sta. Bartolomeo li estis en Nederlando, kie li komandis la sendisciplinajn bandojn de ribelintaj Flandroj kontraŭ la hispana potenco. Perfidite de la feliĉo, li estis devigata, submetiĝi al la duko d' Alba, kiu traktis lin sufiĉe bone. Pli poste, kiam tiom da verŝita sango kaŭzis al Karlo IXa ian konscienc-riproĉon, tiu ĉi venigis lin kaj, kontraŭ ĉiu atendo, akceptis lin plej afable. Tiu

³⁾ Elp.: Bordo.

⁴⁾ Elp.: Guis-oj.

⁵⁾ Elp.: La Nu-on.

ĉi princo, ekstrema en ĉio, supersŭtis per karesoj unu protestanton, kiam li ĵus igis mortigi cent milojn.

Speco de fatalo ŝajnis protekti la sorton de La Noue; jam en la tria burĝa milito li estis kaptata, unue en ĵarnac, poste en Montcontour, kaj ĉiam senpage liberigata de la frato de l' reĝo, malgraŭ la insistoj de liaj kapitanoj, kiuj petegis lin, oferi viron tro danĝeran por esti indulgata, kaj tro honestan por esti subaĉetata. Karlo pensis, ke La Noue rememoros lian pardonemon, kaj li komisiis lin, instigi la Rochelle-anojn al submetiĝo. La Noue akceptis, sed kondiĉe, ke la reĝo ne postulos de li ion, kio estas neakordigebla kun lia honoro. Li foriris, akompanate de itala sacerdoto, kiu devis lin kontroli. Unue li sentis sin humiligita, rimarkante, ke oni lin suspektis. Oni ne lasis lin eniri en la urbon La Rochelle, sed destinis al li por la kunveno vilaĝeton en la ĉirkaŭaĵo. En Tadon li renkontis la delegitojn de La Rochelle. Li konis ilin ĉiujn, kiel oni konas malnovajn militkunulojn, sed ekvidante lin, neniu el ili etendis al li amikan manon, neniu ŝajnis lin koni; li diris sian nomon kaj klarigis la proponojn de la reĝo.

La esenco de lia parolado estis: Fidu al la promesoj de la reĝo; la burĝa milito estas la plej terura malbono. La urbestro de La Rochelle respondis, maldolĉe ridetante: Ni ja vidas viron, kiu similas al La Noue, sed La Noue ne estus proponinta al siaj fratoj, submetiĝi al hommortigistoj. La Noue amis la estintan admiralon, kaj li dezirus lin venĝi, anstataŭ interkonsenti kun liaj mortigintoj. Ne, vi ne estas La Noue.

La kompatinda sendito, traborita ĝis la animo per tiuj paroloj, rememorigis la servojn, kiujn li

faris al la kalvina afero, montris sian detranĉitan brakon kaj certigis sian sindonemon al sia religio.

Iom post iom la malfido de la Rochelle-anoj ŝanceliĝis; ili malfermis siajn pordegojn al La Noue; ili montris al li siajn provizojn kaj eĉ insistis pri tio, ke li konsentu komandi ilin. La propono estis tre alloga por maljuna soldato. La ĵuro al Karlo estis farita sub kondiĉo, kiun oni povis interpreti laŭ sia konscienco. La Noue esperis, ke komandante la Rochelle-anojn, li estos pli kapabla, instigi ilin al pacaj sentoj; li kredis, ke li povos akordigi la ĵuritan fidelecon al sia reĝo kun tiu, kiun li ŝuldis al sia religio. Li eraris.

Reĝa armeo venis por ataki La Rochelle-on. La Noue kondukis ĉiujn elirojn, mortigis multajn katolikojn kaj, reveninte en la urbon, insiste petis la loĝantojn, fari pacon. Kio okazis? La katolikoj kriis, ke li malrespektis sian promeson al la reĝo, kaj la protestantoj akuzis lin pri perfido. En tiaj cirkonstancoj La Noue, satigita de maldolĉaĵoj, penadis esti mortigata, elmetante sin ĉiutage dudek fojojn al danĝero. La sieĝatoj ĵus estis farintaj sufiĉe feliĉan eliron kontraŭ antaŭaj fortikaĵetoj de la katolika armeo. Ili estis plenigintaj plurajn klaftojn da tranĉeoj, renversintaj gabiojn kaj mortigintaj centon da soldatoj. La taĉmento, kiu estis havinta tiun sukceson, eniris en la urbon tra la pordego Tadon. Antaŭe marŝis kapitano Dietrich kun kompanio de pafilistoj; ĉiuj estis ekscite varmigataj, senspiraj kaj soifantaj, certa pruvo por tio, ke ili ne indulgis sin. Poste venis granda trupo da burĝoj, inter kiuj oni rimarkis plurajn virinojn, kiuj ŝajne partoprenis en

la batalo. Poste sekvis kvardeko da kaptitoj, plejparte vunditaj kaj irantaj inter du vicoj da soldatoj, kiuj malfacile defendis ilin kontraŭ la furiozo de la popolamaso sur la vojo. Proksimume dudek kavaliroj formis la postgvardion. La Noue kun Mergy kiel generaladjutanto marŝis lastvice. Lia kiraso estis difektita de kuglo, kaj lia ĉevalo dufoje vundita. En la maldekstra mano li ankoraŭ tenis senŝargitan pistolon, kaj per la hoko, kiu anstataŭ mano eliris el la dekstra brakpeco, li gvidis sian ĉevalon.

— Lasu pasi la kaptitojn, amikoj miaj! — li kriis ĉiumomente. — Estu humanaj, bonaj Rochelle-anoj: ili estas vunditaj kaj ne plu povas defendi sin, ili ne plu estas malamikoj.

Sed la kanajlaro respondis per sovaĝaj kriegoj: “Al pendigilo, la pafistoj, al pendigilo! Kaj vivu La Noue!” Mergy kaj la kavaliroj, disdonante kelkajn batojn per la ligno de siaj lancoj, pligrandigis la efikon de la grandanimaj admonoj de sia kapitano. Fine la kaptitoj estis kondukataj en la urban malliberejon kaj metataj sub fidinda gvardio en lokon, kie ili ne bezonis timi ion pro la furiozo de la popolaĉo. La taĉmento disiĝis en la urbo, kaj La Noue, akompanata nur de kelkaj nobeloj, haltis antaŭ la urbo-domo, el kiu la urbestro eliris, sekvata de kelkaj burĝoj.

— Nu, brava La Noue! — diris la urbestro, — Vi montris al tiuj hombuĉistoj, ke ne ĉiuj kuraĝuloj mortis kun la admiralo.

— La afero sufiĉe bone sukcesis, sinjoro, — respondis La Noue modeste. — Ni havis nur kvin mortintojn kaj malmultajn vunditojn.

— Ĉar vi kondukis la eliron, sinjoro de La Noue, — aldiris la urbestro, — ni jam estis certaj pri la sukceso.

— Estas Dio, kiu donas kaj forprenas la venkon laŭ sia plaĉo, — diris La Noue per kvieta voĉo, — kaj nur lin ni devas danki pro la sukcesoj de la milito. — Kaj turnante sin aparte al la urbestro, li aldiris: “Mi petas vin, sinjoro, havigi al mi cent kvindek volontulojn el la loĝantaro, ĉar mi deziras fari eliron morgaŭ je ektiĝo, en la momento, kiam la soldatoj, kiuj pasigis la nokton en la tranĉeoj, estas ankoraŭ rigidaj de la malvarmo kiel ursoj atakataj dum degelo. Mi rimarkis, ke homoj dormintaj sub tegmento facile venkas matene tiujn, kiuj pasigis la nokton sub la steloj. Sinjoro Mergy, se al vi ne multe urĝas por tagmanĝi, ĉu vi volas fari kun mi promenadon al la bastiono de l’ Evangelio? Mi dezirus vidi, kiajn laborojn faras la malamiko.”

Li salutis la urbestron, kaj apogante sin sur la ŝultro de la junulo, forpaŝis al la bastiono. Ili eniris en momento, post kiam kanonpafo estis ĝismorte vundinta du virojn. La ŝtonoj estis makulitaj de sango, kaj unu el tiuj malfeliĉuloj pĉtegis sian kamaradojn, ke ili finmortigu lin.

La Noue, apogante sin per la kubuto sur la parapedo, rigardis momenton silente la laborojn de la sieĝantoj, kaj turnante sin al Mergy, li diris: “Terura afero estas la milito. Sed burĝa milito! . . . Tiu ĉi kuglego estis metita en francan kanonon, estas Franco, kiu celdirektis la kanonon kaj kiu ekpafis ĝin; kaj estas du Francoj tiuj, kiujn la kuglego mortigis. Ja estas malmulto, mortigi je distanco de duona

mejlo; sed sinjoro Mergy, se oni devas enprofundigi sian spadon en la korpon de homo, kiu pri kompato petegas en via propra lingvo . . . ! Kaj tamen tion ni mem faris hodiaŭ."

— Ha sinjoro, se vi estus vidinta la hombuĉadon de la dudek-kvara de Aŭgusto! Se vi estus transirinta la Seine-on, kiam ĝi estis ruĝa kaj portis pli da kadavroj ol da glacieroj dum la printempa degelo, vi sentus malpli da kompato por la homoj, kiujn ni kontraŭbatalas. Por mi ĉiu pafisto estas hombuĉisto . . .

— Ne kalumniu vian patrolandon. En tiu ĉi armeo, kiu nin sieĝas, estas tre malmultaj de tiuj monstroj, pri kiuj vi parolas. La soldatoj estas francaj kampuloj, kiuj forlasis sian plugilon por perlabori la pagon de la reĝo; la nobeloj kaj la oficiroj batalas, ĉar ili juris fidelecon al la reĝo. Eble ili estas pravaj, kaj ni . . . ni estas ribelantoj.

— Ribelantoj! Nia afero estas justa. Ni batalas por nia religio kaj por nia vivo.

— Mi vidas, ke vi havas malmultajn skrupulojn; ĉu vi estas feliĉa, sinjoro de Mergy? — Kaj la maljuna militisto ĝemis profunde.

Malvarma pluveto, kiu senĉese falis dum la tuta nokto, fine ĉesis en la momento, kiam la tagiĝo ekvidiĝis sur la ĉielo per malhela lumo en oriento. Pene ĝi traboris pezan nubon, kiun la vento pelis tien kaj reen, farante en ĝi larĝajn truojn, sed tiuj grizaj nuberoj baldaŭ rekuniĝis, kvazaŭ ondoj tranĉitaj de ŝipo refalas, plenigante la ĵus faritan sulkon.

La kamparo, kovrita de tiu densa vaporo, traborita de kelkaj arbopintoj, similis vastan subakvejon.

En la urbo la necerta matena lumo, miksitaj kun brilo de la torĉoj, lumumis sufiĉe multnombran trupon da soldatoj kaj volontuloj, kunigitan en la strato, kiu kondukis al la bastiono de l' Evangelio. Ili frapis la pavimon per la piedoj kaj moviĝis, ne ŝanĝante sian lokon, kiel homoj trapenetritaj de la malseka malvarmo de matenkrepusko dumvintra. La blasfemoj kaj energiaj plendomurmuroj ne estis ŝparataj kontraŭ tiu, kiu devigis ilin, surpreni la batalilojn tiel frumatene, sed malgraŭ iliaj insultoj oni divenis el iliaj interparoloj la bonhumoron kaj la esperon de soldatoj gvidataj de fidinda ĉefo. Per tono duon-ŝerca duon-kolera ili diris:

— Tiu malbenita Ferbrako, tiu sendorma Johano ne povas matenmanĝi, antaŭ ol li faris vekmuzikon al tiuj infan-mortigistoj. La febro lin prenu! Kun li oni neniam estas certa, havi bonan nokton.

Dum oni disdonis alkoholon al la soldatoj, la oficiroj, ŝarantaj ĉirkaŭ La Noue sub antaŭtegmento de butikoj, aŭskultis kun intereso la planon de l' atako, kiun li intencis fari kontraŭ la sieĝanta armeo. Tamburado aŭdiĝis, ĉiu reokupis sian postenon; pastro alvenis, benis la soldatojn kaj admonis ilin, plenumi sian devon, sub promeso de eterna vivo, se okazos, ke ili ne povos reveni en la urbon por ricevi la rekompenccon kaj la dankon de siaj samlandanoj.

La prediko estis mallonga, sed La Noue jam opiniis ĝin tro longa. Li ne plu estis la sama viro, kiu la antaŭan tagon bedaŭris ĉiun guton da franca sango verŝitan en tiu milito. Li nur estis soldato kaj ŝajnis senpacienca por revidi scenon de buĉado. Post kiam la pastro estis fininta sian alparolon kaj la soldatoj

estis respondintaj "Amen", li kriis per forta kaj severa voĉo:

— Kamaradoj, sinjoro pastro ĵus diris al ni veron: ni rekomendu nin al Dio kaj al la Virgulino de Forta Bato.

Li faris mansignon, oni kanonpafis, kaj la tuta trupo marŝis grandapaŝe al la kamparo; samtempe rotoj da soldatoj, elirante tra diversaj pordegoj, iris alarmi plurajn punktojn de la malmikaj linioj, por kredigi al la katolikoj, ke ili estas atakataj ĉiufланke, tial ke ili ne kuraĝu sendi ĉiujn fortojn kontraŭ la ĉefatako, por ne malfortigi parton de sia defenda fronto ĉie minacata.

La bastiono de l' Evangelio, kontraŭ kiu la inĝenieroj de l' armeo katolika direktis siajn klopodojn, precipe suferis pro baterio de kvin kanonoj; ĝi estis starigita sur altaĵo, kie estis ruinigita konstruaĵo, kiu antaŭ la sieĝo estis muelilo. Fosaĵo kun tera parapedo defendis la alproksimiĝon flanke de la urbo, kaj antaŭ la fosaĵo oni postenis plurajn pafistojn gardostare. Sed, kiel antaŭvidis la protestanta kapitano, iliaj pafiloj elmetitaj dum kelkaj horoj al la malseko, devis esti preskaŭ senutilaj, kaj la atakantoj, provizitaj de ĉio kaj pretigitaj por la atako, havis gravan avantaĝon kompare al homoj surprizitaj subite, lacigitaj de sendormeco, malsekaj de pluvo kaj rigiditaj de malvarmo.

La unuaj gardostarantoj estas mortigitaj. Per kelkaj pafiloj, mirakle pafintaj, la gvardio de la baterio estas vekata ĝustatempe por vidi la protestantojn jam en la fosaĵo kaj rampantaj kontraŭ la terparapedo de la muelilo. Iuj klopodas rezisti, sed

iliaj bataliloj elfalas el la manoj rigidaj pro malvarmo; preskaŭ ĉiuj pafiloj malfunkcias, dum neniuj pafo de la atakantoj perdiĝas. La venko ne estas duba, kaj la protestantoj, jam venkintoj de la baterio, elpuŝas sovaĝan krion:

— Neniu indulgo! Rememoru pri la dudek-kvara de Aŭgusto!

Kvindeko da soldatoj kun sia kapitano loĝis en la muelila turo; la kapitano en noktoĉapo kaj kalsono, tenante kapkusenon en unu mano kaj spadon en la alia, malfermas la pordon kaj demandas, de kio devenas la bruego. Tute ne pensante pri eliro de la malamiko, li imagis, ke la bruoj devenis de malpaco inter liaj propraj soldatoj. Li estis kruele seniluziigata. Bato de halebardo kuŝigis lin teren en lia sango.

La soldatoj havis tempon por barikadi la pordon de la turo, kaj dum kelka tempo ili defendis sin kun sukceso, pafante el la fenestroj. Sed senpere kontraŭ tiu konstruaĵo staris granda amaso da pajlo kaj fojno kun branĉoj, destinitaj por fari gabiojn. La protestantoj ekbruligis ĝin, kaj baldaŭ la fajro ĉirkaŭis la turon kaj altiĝis ĝis la supro. Korŝiraj krioj eliris el ĝi. La tegmento brulis kaj estis falonta sur la kapojn de la malfeliĉuloj, kiujn ĝi kovris. La pordo ankaŭ brulis, kaj la barikadoj, kiujn ili faris, malhelpis ilin, eliri sur tiu vojo. Provante salti el la fenestroj, ili falus en la flamojn aŭ sur la lancopintojn.

Oni tiam vidis abomenan spektaklon. Juna oficiro, vestita per kompleta kirasajo, klopodis salti kiel la ceteraj tra mallarĝa fenestro. La malsupra parto

de la kiraso konsistis, laŭ la tiama ofta modo, el speco de ferjupo, kiu kovris la krurojn kaj ventron kaj plilarĝiĝis kiel renversita funelo, por faciligi la marŝadon. La fenestro ne estis sufiĉe larĝa por ellasi tiun parton de la kirasajo, kaj la konfuzita junulo elĵetigis sin tiel fortege, ke la plej granda parto de lia korpo pendis ekstere tiel, ke li ne povis movi sin; li estis kvazaŭ kaptita en premilo.

Dume la flamoj supreniris al li, varmigis lian kirason kaj bruligis lin malrapide, kvazaŭ li estus en fajrejo aŭ en la fama fera virbovo elpensita de Phalaris. La kompatindulo eligis terurajn kriojn kaj vane etendis siajn brakojn, petante helpon. Momento da silento regis inter la atakantoj, kaj poste ĉiuj kune kaj kvazaŭ interkonsente elpuŝis militkrion por sin surdigi kaj ne aŭdi la ĝemojn de la brulanta viro. Li malaperis en mezo de flamoj kaj fumo, kaj tra la ruinoj de la turo oni vidis ruĝigitan, fuman-tan helmon.

Dum parto de la Rochelle-anoj persekutis la fugantojn, la ceteraj enajlis la kanonojn, rompis la radojn kaj jetis en la fosaĵojn la gabiojn de la baterio kaj la kadavrojn de ĝiaj defendintoj.

La Konkero de la Reduto

Militisto el miaj amikoj, kiu mortis antaŭ kelkaj jaroj pro febro en Greklando, iam rakontis al mi la unuan batalon, kiun li ĉeestis. Lia rakonto frapis min tiel forte, ke mi skribis ĝin memore, tuj kiam mi havis liberan momenton.

“Mi alvenis ĉe la regimento la 4an de Septembro vespere. Mi trovis la kolonelon en la bivako. Unue li akceptis min iom abrupte, sed leginte la rekomen-dan leteron de generalo B..., li ŝanĝis sian sinten-adon kaj diris al mi kelkajn afablajn parolojn.

Li prezentis min al mia kapitano, kiu ĵus revenis de kontrol-vizito. Tiu kapitano, kiun mi apenaŭ havis la tempon ekkoni, estis granda bruna viro kun malafabla malplaĉa fizionomio. Kiel simpla soldato li akiris siajn oficirajn epoletojn kaj sian krucon sur la batakampoj. Lia voĉo, kiu estis raŭka kaj malforta, strange kontrastis kun la preskaŭ gigantaj proporcioj de lia korpo. Oni diris al mi, ke tiu nenatura voĉo devenis de kuglo, kiu traboris lin dum la batalo de Jena.

Aŭdante, ke mi ĵus eliris el la militlernejo de Fontainebleau¹⁾, li kuntiris la vizaĝon, dirante: —

¹⁾ Elp.: Fontenblo.

Mia leŭtenanto mortis hieraŭ. Mi komprenis, ke tio signifas: Vi devas lin anstataŭi, sed vi ne estas kapabla. Akra vorto venis al miaj lipoj, sed mi retenis ĝin.

La luno aperis malantaŭ la reduto de Ĉeverino, kiu staris en distanco de du kanonpaŝoj de nia bivako. Ĝi estis larĝa kaj ruĝa, kiel kutime ĉe la leviĝo. Sed tiun vesperon ĝi ŝajnis al mi eksterordinare granda. Dum momento la reduto desegniĝis nigre sur la blindiga disko de la luno. Ĝi similis konuson de vulkano dum erupcio.

Maljuna soldato, kiu staris apud mi, rimarkis la koloron de la luno: — Ĝi estas tre ruĝa, — li diris; — tio signifas, ke kostos al ni multon por ĝin akiri, tiun faman reduton!

Mi ĉiam estis superstiĉa, kaj tiu aŭguro, precipe en tiu momento, iom malkvietigis min. Mi kuŝigis min, sed ne povis dormi. Mi leviĝis kaj marŝis kelkan tempon, rigardante la grandegan linion de fajroj, kiuj kovris la altaĵon post la vilaĝo Ĉeverino.

Kiam mi pensis, ke la freŝa kaj tranĉa aero nokta sufiĉe malvarmigis mian sangon, mi revenis apud la fajron; mi envolvis min en mian mantelon kaj fermis la okulojn, esperante ne malfermi ilin antaŭ la tago. Sed la dormo ne venis. Iom post iom miaj pensoj fariĝis pli funebre nigraj. Mi pensis, ke mi ne havas unu solan amikon inter la cent mil homoj, kiuj plenigis la ebenajon. Se mi estos vundita, mi estos en malsanulejo, senzorge flegata de nekleraj ĥirurgoj. Tio, kion mi aŭdis pri ĥirurgiaj operacioj, revenis al mia memoro. Mia koro fortege batis, aŭtomate mi aranĝis kiel specon de kiraso la naz-

tukon kaj la poŝlibron, kiujn mi havis sur la brusto. La laceco premegis min; ĉiumomente mi ekdormetis, sed ĉiumomente iu malgajega penso trudis sin pli forte kaj vekis min subite.

Tamen fine la laceco venkis, kaj kiam la vektamburado sonis, mi estis tute endormiĝinta. Ni starigis nin rangvice, oni faris nomkontrolojn, kaj oni remetis la pafilojn piramide. Ĉio ŝajnis antaŭdiri, ke ni pasigos trankvilan tagon.

Ĉirkaŭ la tria horo generaladjutanto alvenis kun ordono. Oni igis nin preni la pafilojn; niaj pafistoj disiĝis en la ebenajon; ni sekvis ilin malrapide, kaj post dudek minutoj ni vidis la antaŭpostenojn de la Rusoj returniri kaj reveni en la reduton.

Artileria taĉmento posteniĝis ĉe nia dekstra flanko, alia ĉe la maldekstra, sed ambaŭ multe pli antaŭe de ni. Ili komencis vivegan pafadon al la malamiko, kiu energie respondis, kaj baldaŭ la Ĉeverina reduto malaperis sub densaj fumnuboj.

Nia regimento estis preskaŭ tute ŝirmita kontraŭ la pafado de la Rusoj per terena altaĵeto. Iliaj kanonkugloj, cetere maloftaj por ni, ĉar ili prefere celis niajn kanonistojn, preterpasis super niaj kapoj kaj sendis al ni nur teron aŭ ŝtoneĵojn.

Tuj kiam la ordono antaŭenmarŝi estis donita, mia kapitano rigardis min kun atento, kiu devigis min, du- aŭ trifoje pasigi la manon sur miaj junaj lipharoj kun aspekto kiel eble plej sentima. Efektive mi ne malkuraĝiĝis, la sola timo, kiun mi sentis, estis, ke oni imagu, ke mi timas. La sendanĝeraj kanonkugloj ankaŭ kontribuis al tio, ke mi gardis mian heroan trankvilon. Mia persona sinamo diris

al mi, ke mi troviĝis en granda danĝero, ĉar mi reale estis sub la fajro de baterio. Mi estis ĉarmita, senti min tiel senĝene, kaj mi jam pensis pri la plezuro, rakonti la konkeron de Ĉeverino en la salono de sinjorino de Saint-Luscan, en Strato Provenco.

La kolonelo paŝis antaŭ nia kompanio; li sin turnis al mi:

— Nu, vi baldaŭ pasigos malkomfortan momenton por via komenco.

Mi ridetis kun aspekto tute ĉielitema, broŝante la manikon de mia vesto, sur kiu kuglego, falinta je tridek paŝoj de mi, estis ĵetinta iom da polvo.

Ŝajnas, ke la Rusoj rimarkis la senefikecon de sia pafado per kuglegoj, ĉar ili anstataŭigis ilin per obusoj, kiuj povis pli facile atingi nin en la profundaĵo, kie ni estis. Iom granda splito faligis mian ĉakon kaj mortigis viron apud mi.

— Mi gratulas vin, — diris mia kapitano, kiam mi reprenis mian ĉakon. Nun vi estos trankvila dum la resto de la tago.

Mi konis tiun superstiĉon de militistoj, kiuj kredas, ke la parolo "non bis in idem²⁾" estas aksiomo sur la batalkampo same kiel en tribunalo. Fiere mi remetis mian ĉakon sur mian kapon.

— Tion mi nomas igi la homojn saluti sen-ceremonie, — diris mi tiel gaje kiel mi povis. Tiu malbona ŝerco en tiu cirkonstanco ŝajnis bonega.

— Mi gratulas vin, — aldiris la kapitano, — vi ricevus nenion plian, kaj vi hodiaŭ vespere komandos kompanion, ĉar mi bone sentas, ke la forno varmiĝas

²⁾ Ne dufoje en sama afero. (La tradukinto.)

por mi³⁾. Ĉiufoje, kiam mi estis vundata, la oficiro apud mi estis ricevinta senefikan kuglon, — kaj li aldonis pli mallaŭte kaj iom honte, — iliaj nomoj komenciĝis ĉiam per la litero P.

Mi afektis superan malŝateman mentalecon; aliaj estus farintaj la samon, frapitaj de tiuj profetaj paroloj. Kiel nove bakita oficiro mi sentis, ke mi povis konfidi miajn pensojn al neniu, kaj ke mi ĉiam devis ŝajni malvarme kuraĝa.

Post duona horo la fajro de la Rusoj senteble malfortiĝis, tiam ni eliris el nia ŝirmejo por marŝi al la reduto.

Nia regimento estis kunmetita el tri batalionoj. La dua ricevis la ordonon, ĉirkaŭiri la reduton ĝis proksime al la malfermaĵo, la du aliaj devis fari la atakon. Mi estis en la tria bataliono.

Elirante el la speco de parapedo, kiu nin ŝirmis, ni estis akceptataj de pluraj muskedaj salvoj, kiuj nur malmulte difektis niajn vicojn. La siblo de la kugloj surprizis min; ofte mi turnis la kapon, kaj mi altiris al mi kelkajn ŝercojn de miaj kamaradoj kutimiĝintaj al tiu bruoj. Mi diris al mi mem: Finfine kuglo ne estas tiel terura afero.

Ni avancis kure post la antaŭaj pafistoj; subite la Rusoj elpuŝis tri hura-kriojn, tri hura-kriojn mal-konfuzajn kaj restis silentaj nepafante.

— Mi ne ŝatas tiun silenton, — diris mia kapitano, — tio antaŭdiras nenion bonan. Mi opiniis, ke niaj homoj estis iom tro bruemaj, kaj mi ne povis deteni

³⁾ Tio signifas: ke danĝero minacas min. (La tradukinto.)

min, fari por mi mem komparon inter iliaj laŭtaj krioj kaj la impona silento de la malamiko.

Baldaŭ ni alvenis ĉe la piedo de la reduto, la fostaroj estis rompita kaj la tero plugita de niaj kanonkugloj. La soldatoj sin ĵetegis sur tiujn novajn ruinoj, kriante: Vivu la imperiestro! pli laŭte, ol oni povis atendi de homoj, kiuj jam tiel multe kriis.

Mi levis la okulojn, kaj neniam mi forgesos la spektaklon, kiun mi vidis. La plej granda parto de la fumo estis leviĝinta kaj ŝvebis kiel baldaŭeno dudek futojn super la reduto. Tra flave-blua vaporo oni ekvidis post ilia duone detruita parapedo la rusajn grenadistojn kun alten tenataj pafiloj, senmovajn kvazaŭ statuoj. Mi ankoraŭ nun opinias vidi ĉiun soldaton, kun la maldekstra okulo fiksita al ni kaj la dekstra kaŝita per la levita pafilo. En embrazuro, je kelkaj futoj de ni, viro tenanta meĉajon staris apud kanono.

Mi frostotremis kaj kredis, ke mia lasta horo estis alveninta.

— Jen la danco komenciĝas, — ekkriis mia kapitano. — Bonan vesperon! — Estis la lastaj paroloj, kiujn mi aŭdis de li.

Tamburado aŭdiĝis en la reduto. Mi vidis ĉiujn pafilojn malaltiĝi. Mi fermis la okulojn kaj aŭdis teruregan tondradon, sekvatan de krioj kaj ĝemoj. Mi malfermis la okulojn, surprizita, esti ankoraŭ vivanta. La reduto denove estis envolvita per fumo. Mi estis ĉirkaŭata de vunditoj kaj mortintoj. Mia kapitano kuŝis je miaj piedoj: lia kapo estis frakasita de kuglego, kaj mi estis kovrita de lia cerbo kaj de

lia sango. De mia kompanio restis nur dek viroj kaj mi.

Post tiu hombuĉado regis momento de konfuzo silenta. La kolonelo, metinte sian ĉapelon sur la pinton de sia spado, kiel unua surgrimpis la parapedon, kriante: Vivu la imperiestro! Tuj ĉiuj postvivantoj sekvis lin. Klaran rememoron pri tio, kio okazis poste, mi preskaŭ ne plu havas. Mi ne scias, kiel ni eniris en la reduton. Oni batalis homo kontraŭ homo en mezo de tiel densa fumo, ke oni ne povis vidi unu la alian. Mi kredas, ke mi batis, ĉar mia sabro estis sangomakulita. Fine mi aŭdis la krion: Venko! kaj kiam la fumo estis maldensiĝinta, mi ekvidis sangon kaj kadavrojn, sub kiuj malaperis la tero de la reduto. Precipe la kanonoj estis preskaŭ surŝutitaj per la amasoj de mortintoj. Proksimume ducent soldatoj en franca uniformo staris senorde, unuj ŝargantaj la pafilojn, aliaj viŝantaj la bajonetojn. Dek unu rusaj kaptitoj estis kun ili.

La kolonelo sangokovrite estis renversita sur rompita municia kesto apud la murbreĉo. Kelkaj soldatoj ĉirkaŭis lin por helpo; mi alproksimiĝis.

— Kie estas la plej malnova kapitano? — demandis li al serĝento.

La serĝento levis la ŝultrojn kun multe-diranta esprimo.

— Kaj la plej malnova leŭtenanto?

— Jen la sinjoro, kiu alvenis hieraŭ, — diris la serĝento per voĉo tute kvieta.

— La kolonelo ridetis maldolĉe.

— Nu, sinjoro, — li diris al mi, — vi havas la ĉefan komandon: tuj fortikigu la malfermajon de la reduto per tiuj municiaj ĉaroj, ĉar la malamiko estas forta, sed la generalo C... baldaŭ sendos al ni subtenon.

— Kolonelo, — mi diris, vi estas grave vundita?

— Mortfrapita, mia kara, sed la reduto estas nia.”

Letero pri Virbovaj Bataloj

Madrid, Oktobro 1830

La bataloj kontraŭ virbovoj estas ankoraŭ nun tre popularaj en Hispanujo, sed inter la Hispanoj altrangaj estas malmultaj, kiuj ne iomete hontas, konfesante sian guston por tiu speco de spektaklo efektive tre kruela. Pro tio ili serĉas plurajn gravajn motivojn por ĝin pravigi. Unue ĝi estas nacia amuzajo. La vorto nacia jam sole sufiĉus, ĉar la publika patriotismo estas same forta en Hispanujo kiel en Francujo. Krome, ili diras, la Romanoj estis ankoraŭ pli barbaraj ol ni, ĉar ili igis batali homojn kontraŭ homoj. Fine, aldonas la ekonomiistoj, la agronomio profitas el tiu kutimo, ĉar la alta prezo de la virbovoj por bataloj instigas la terposedantojn, bredi multajn bovarojn.

Estas grave scii, ke ne ĉiuj virbovoj havas la econ, persekuti kaj ataki homojn kaj ĉevalojn, kaj ke inter dudek el ili troviĝas apenaŭ unu taŭga por aperi en cirko; la ceteraj dek naŭ servas por la terkulturo. La sola argumento, kiun oni ne kuraĝas eldiri, sed kiu estus nekontraŭdirebla, estas, ke tiu spektaklo, ĉu kruela ĉu ne, estas tiel interesega, tiel

ekscitanta, naskas tiel potencajn emociojn, ke oni ne povas rezigni pri ĝi, kiam oni eltenis la efikon de la unua ĉeesto.

La fremduloj, kiuj unuafoje eniras la cirkon kun ia abomeno kaj nur por konsciencie plenumi la devojn de vojaĝantoj, tiuj samaj fremduloj baldaŭ pasiigas por tiu sporto tiom, kiom la Hispanoj mem. Tion oni devas konfesi je honto de la homaro, la batalo kun ĉiuj siaj abomenaĵoj havas neordinarajn ĉarmojn precipe por tiuj, kiuj ĝin rigardas ŝirmate.

Rakontas Sankta Aŭgusteno, ke dum sia juneco li sentis ekstreman malamon kontraŭ la bataloj de gladiatoroj, kiujn li neniam estis vidinta. Devigita per iu el siaj amikoj, akompani lin al unu el tiuj pompaj hombuĉadoj, li ĵuris al si mem, fermi la okulojn dum la tuta tempo de la prezentado. Unue li sufiĉe bone plenumis sian promeson kaj klopodis, pensi pri io alia, sed aŭdante krion de la tuta popolamaso, kiam falis fama gladiatoro, li malfermis la okulojn; li malfermis kaj ne plu povis refermi ilin. De tiam kaj ĝis sia konvertiĝo li estis unu el la plej pasiaj amatoroj de la cirkoludoj.

Post tiel granda Sanktulo mi hontas citi min; vi tamen scias, ke mi ne havas la gustojn de hommanganto. Kiam mi la unuan fojon eniris en la cirkon de Madrid, mi timis, ke mi ne povos suferi la vidon de l' sango, kiun oni tie malavare fluigas; precipe mi timis, ke mia sentemo, pri kiu mi malfidis, igos min ridinda antaŭ la harditaj kutimintoj, kiuj invitis min en sian loĝion. Malprava timo! Post la mortigo al la unua virbovo mi ne plu pensis pri eliro. Du horoj pasis sen iu eta interakto, kaj

mi ankoraŭ ne estis laca. Nenia tragedio en la mondo iam interesis min tiagrade. Dum mia restado en Hispanlando mi ne preterlasis unu solan batalon kaj ruĝigante mi konfesas, ke mi pli multe ŝatas la batalojn kun mortigo al la virbovoj ol tiujn, en kiuj oni kontentigas incitegi ilin, kiam ili havas bulojn sur la kornoj. Estas la sama diferenco kiel inter la ĝismortaj turniroj kaj tiuj kun lanceoj. Kvankam la duspecaj bataloj multe intersimilas, tamen en la dua la danĝero por la homoj estas preskaŭ nula.

La antaŭtago de virbova batalo jam estas festo. Por eviti akcidentojn, oni enkondukas la virbovojn en la stalon de l' cirko (encierro) nur dumnokte, kaj la tagon antaŭ tiu de l' batalo ili paŝtas sin sur herbejo proksima al Madrid (el arroyo).

Estas celo de promenado, iri por vidi tiujn virbovojn, kiuj ofte venas de tre malproksime. Multegaj veturiloj, rajdantoj kaj piedirantoj iras al la arroyo. Por tiu okazo multaj junuloj surmetas la elegantan veston de la andaluzaj majo-oj¹⁾ kaj elmontras grandiozecon kaj lukson neeban per la ordinaraĵ vestaĵoj. Cetere tiu promenado ne estas tute sendanĝera: la virbovoj iradas en libereco, ili ne obeas facile siajn gardistojn, kaj la videmuloj devas zorgi mem por eviti kornbatojn.

Ekzistas cirkoj (plazas) en preskaŭ ĉiuj grandurboj de Hispanlando. Tiuj konstruaĵoj estas tre simple, eĉ tre krude faritaj²⁾. Ili estas kutime nur

¹⁾ Malaltklasaj dandoj.

²⁾ Nuntempe ili estas ĝenerale multe pli luksaj kaj komfortaj. La nove konstruita plaza de Madrid entenas 40 000 sidlokojn. (La tradukinto.)

lignaj barakoj, kaj oni citas kiel admirindaĵon la amfiteatron de Ronda, ĉar ĝi konsistas tute el ŝtonoj. Ĝi estas la plej bela en Hispanlando, kiel la kastelo de Thunderten-Tronkh estis la plej bela en Vestfalio, ĉar ĝi havis pordon kaj fenestrojn. Sed ĉu la ornamaĵo de teatro estas grava, se la spektaklo estas bonega?

La cirko de Madrid povas enteni proksimume ses mil personojn, kiuj senkonfuze eniras kaj eliras tra multnombraj pordoj. Oni sidas sur lignaj aŭ ŝtonaj benkoj; kelkaj loĝioj havas seĝojn. Tiu de la Reĝa Katolika Moŝto sole estas elegante ornamita.

La areno estas ĉirkaŭata de forta palisaro, alta preskaŭ kvin futojn. Je du futoj super tero elstaras laŭ la tuta longeco ambaŭflanke de la palisaro speco de ŝtupo aŭ benketo, kiu utilas al la persekutata toreadoro, pli facile transsalti la barilon. Mallarĝa koridoro apartigas ĝin de la ŝtupaj sidbenkoj de la spektatoroj, kiuj estas tiel altaj kiel la bariloj kaj krom tio ŝirmataj per duobla ŝnurego subtenata de fortaj fostoĵoj. Tiu singardo ekzistas de antaŭ kelkaj jaroj. Iam virbovo ne nur supersaltis la barilon (tio ofte okazas), sed ĵetis sin ĝis la sidbenkoj, kie li mortigis kaj vundis multajn rigardantojn. Laŭdire la ŝnurego sufiĉas por malhelpi la ripetigon de tia akcidento.

Kvar pordoj malfermiĝas el la areno. Unu kondukas al la virbova stalo (toril), alia al la buĉejo (matadero), kie oni senhaŭtigas kaj dispecigas la virbovojn. La ceteraj utilas al la homaj aktoroj de la tragedio.

Iom antaŭ la batalo la toreadoroj³⁾ kunvenas en ĉambro apud la cirko. Tute proksime estas la ĉevaloj; poste la malsanulejo. Ĥirurgo kaj pastro, pretaj por zorgi pri la vunditoj, restas en la ĉirkaŭejo.

La kunveneja salono estas ornamita de madono pentrita, antaŭ kiu lumas kandeloj; malsupre oni vidas tablon kun eta fajrujo entenanta brulantajn karbojn. Enirante, ĉiu torero unue forprenas sian ĉapelon antaŭ la madonbildo, rapide murmuras pecon de preĝo, poste eltiras cigaron el sia poŝo, ekbruligas ĝin en la fajrujo kaj fumas, interparolante kun la kamaradoj kaj amatoroj, kiuj venas por diskuti kun li pri la meritoj de la tuj batalontaj virbovoj.

Samtempe en interna korto la rajdantoj, kiuj devas lukti surĉevalo, pretiĝas por la batalo, provante siajn ĉevalojn. Tiucele ili forpuŝas ilin galope kontraŭ muro, kiun ili frapas per longa stango kvazaŭ per lanco. Ne forlasante tiun apogpunkton, ili ekzercigas siajn rajdbestojn, rapide turniĝi kiel eble plej proksime al la muro. Vi tuj vidos, ke tiu ekzerco ne estas senutila. La uzataj bestoj estas forigindaj ĉevalaĉoj, aĉetitaj malkare. Antaŭ eniro en la arenon, pro timo, ke la krioj de l' popolamaso kaj la vido de la virbovoj ilin timigos, oni bandaĝas iliajn okulojn kaj plenigas iliajn orelojn per malseka ŝtupo.

Vivega estas la aspekto de la cirko. Jam antaŭ la batalo la areno estas plena de homoj; la sidŝtupoj kaj loĝioj prezentas konfuzan amason da kapoj.

³⁾ Aŭ torero, kiu estas la vera hispana vorto. (La tradukinto.)

Ekzistas duspecaj sidlokoj: sur la flanko de l' ombro estas la plej karaj kaj plej konvenaj, sed la suna flanko estas ĉiam okupita de sentimaj amatoroj. Oni vidas malpli multajn virinojn ol virojn, kaj la plimulto apartenas al la klaso de manolas (koketulinaj). Tamen, en la loĝioj oni rimarkas kelkajn elegantajn vestojn, sed malmultajn junajn virinojn⁴⁾. La francaj kaj anglaj romanoj malbonfamigis la Hispaninojn kaj senigis ilin de la respekto al iliaj malnovaj kutimoj. Mi ne kredas, ke estas malpermesite al la ekleziuloj, ĉeesti tiujn spektaklojn, sed mi vidis nur unu kun ekleziula vesto (en Sevilla). Oni diris al mi, ke pluraj iras alivestitaj.

Je signalo donita de la batal-prezidanto, ĉefalguazil⁵⁾, akompanata de du alguazil-oj en kostumoj de Crispin⁶⁾, ĉiuj tri sur ĉevaloj kaj sekvataj de rajdantaro forpelas la publikon el la areno kaj la mallarga koridoro antaŭ la sidstupoj. Post kiam ili foriĝis kun sia sekvantaro, heroldo akompanata de notario kaj de aliaj alguazil-oj venas piede por legi en mezo de l' cirko dekreton, kiu malpermesas ĵeti ion en la arenon, maltrankviligi la batalantojn per krioj aŭ signoj ktp. Apenaŭ li aperis kaj malgraŭ la respektinda formulo: "Je nomo de la Reĝo, nia sinjoro, kiun Dio gardu longe . . .", mokrrioj kaj sibloj eksonas el ĉiuj lokoj kaj daŭras tiel longe, kiel la legado de la dekreto, kiu cetere neniam estas obeata. En la cirko, sed nur tie, la

⁴⁾ Nuntempe la malo estas vera. (La tradukinto.)

⁵⁾ Policestro.

⁶⁾ Speco de arlekeno.

popolo ordonas kvazaŭ reĝe, kaj ĝi povas fari kaj diri ĉion, kion ĝi volas⁷⁾.

Estas du ĉefaj klasoj de toreroj: la picadores (elp.: pikadores), kiuj batalas rajdante kaj armitaj per lanco, kaj la chulos (ĉulos), kiuj piede persekutas la virbovon, movante helkolorajn mantelojn. Inter la lastaj estas la bandilleros kaj la matadores, pri kiuj mi baldaŭ parolos. Ĉiuj surhavas la andaluzan kostumon similan al tiuj de Figaro en la Barbiro de Sevilla; sed anstataŭ pantaloneton kaj silkŝtrumpojn la pikadoroj havas longan pantalonon el dika led, plifortigita per ligno kaj fero por ŝirmi iliajn krurojn kaj femurojn kontraŭ kornbatoj. Surpiede ili iradas, malstreĉante la krurojn kvazaŭ cirkele; renversitaj de la ĉevaloj, ili preskaŭ ne povas releviĝi sen helpo de la ĉuloj. Iliaj seloj estas tre altaj, en formo de la turkaj, kun feraj piedingoj similaj al lignoŝuoj, kiuj kovras la tutan piedon. Por obeigi siajn ĉevalaĉojn, ili havas spronojn provizitajn per longaj pikiloj. Ilia pikstango estas dika, fortega, finiĝanta en tre akra ferpinto; sed ĉar oni devas daŭrigi la plezuron pli longe, tiu pinto estas garnita per ŝnurkuseneto, kiu malhelpas la pinton, enpenetri en la korpon de la virbovo je pli ol unu colo.

Unu el la alguazil-oj surĉevalaj ricevas en sian ĉapelon ŝlosilon, kiun ĵetas al li la direktoro de la bataloj. Tiu ŝlosilo malŝlosas nenion, tamen li portas ĝin al la homo, kies ofico estas, malfermi la toril-on, kaj tuj forkuras galope, akompanata de

⁷⁾ De post la restarigo de la konstitucio oni ne plu legas la dekreton de la reĝo, nia sinjoro. (La aŭtoro.)

la mokridoj de l' popolo, kiu krias, ke la virbovo jam eliris, kaj lin persekutas. Tiu ĉi ŝerco ripetigas en ĉiu korrida.

Dumtempe la pikadoroj okupis siajn postenojn. Estas kutime du el ili surĉevale en la areno; du aŭ tri aliaj ekstere restas disponeblaj por anstataŭi ilin en okazo de akcidento kiel morto, grava vundiĝo ktp. Dekduo da ĉuloj piede estas disstarigitaj en la cirko, proksimaj por reciproka helpo.

Antaŭe kaj intence incitita en sia kaĝo, la virbovo eliras furioze. Kutime ĝi alvenas per unu salto ĝis la mezo de l' cirko, kaj ĝi haltas subite, surprizita de la bruoj, kiuj ĝi aŭdas, kaj de la ĉirkaŭanta vidaĵo. Ĝi portas sur la nuko fasketon da rubandoj fiksitajn per hoketo, kiu eniĝis en la haŭton. La koloro de l' rubandoj sciigas pri la bovaro (vacada), el kiu ĝi devenas, sed sperta amato ekkonas nur per la vido, al kiu provinco aŭ raso ĝi apartenas.

La ĉuloj alproksimiĝas kaj antaŭjetas siajn brilruĝajn mantelojn (capa) kaj provas altiri la virbovon al unu el la pikadoroj. Se la besto estas kuraĝa, ĝi senhezite atakas. La pikadoro, forte tenante sian ĉevalon, staras kun sia pikstango sub la brako rekte antaŭ la virbovo. Li profitas la momenton, kiam ĝi mallevas la kapon, preta por kornpuŝi, kaj akceptas ĝin per lancobato sur la nukon, sed ne en alian korpoparton. Li apogas sin sur la stango per la tuta forto de sia korpo, kaj samtempe li foririgas la ĉevalon maldekstren tiamaniere, ke la virbovo restu dekstre. Se ĉiuj ĉi tiuj movoj estas bone faritaj, se la pikadoro estas

fortika kaj lia ĉevalo obeema, la virbovo, pelita de sia propra vivegeco, preterpasas ne tuŝante lin. Poste la tasko de la ĉuloj estas, okupi la virbovon, por lasi al la pikadoro tempon por malproksimiĝi; sed ofte la besto tro bone rekonas tiun, kiu lin vundis: abrupte ĝi turniĝas, postkuras la ĉevalon pli rapide ol ĉi tiu kuras, enpenetrigas siajn kornojn en la ventron kaj renversas ĝin kun ĝia rajdanto.

Tiu ĉi estas tuj helpata de la ĉuloj; unuj levas lin, aliaj, jetante siajn mantelojn kontraŭ la kapo de la virbovo, deturnas ĝin kaj altiras ĝin al si, ili forkuras de ĝi, supersaltante la barilon kun admirinda lerteco. La hispanaj virbovoj kuras tiel rapide kiel ĉevaloj, kaj se la ĉulo estas tre malproksime de la barilo, li malfacile saviĝas. Pro tio la rajdantoj, kies vivo dependas ĉiam de la lerteco de l' ĉuloj, malofte kuraĝas iri ĝis en la centro de l' cirkejo; se ili tion faras, oni konsideras ĝin kiel agon eksterordinare sentiman.

Restariĝinte, la pikadoro tuj resaltas sur sian ĉevalon, se li povas ankaŭ ĝin starigi. Ne estas grave, se la kompatinda besto perdas fluegon da sango, se ĝia internaĵo faltreniĝas sur la tero kaj kuntordiĝas kun ĝiaj kruroj; tiel longe kiel ĉevalo povas marŝi, ĝi devas sin prezenti al la virbovo. Se ĝi restas surtere, la pikadoro eliras el la cirkejo kaj senprokraste revenas sur alia ĉevalo.

Mi diris, ke la lancobatoj povas nur malprofunde vundi la virbovon, kaj ke ili ne havas alian efikon ol ĝin inciti. Tamen la batoj de la ĉevalo kaj de la rajdanto, la movoj, kiujn ĝi faras, precipe la ricevitaj skuegoj, kiam ĝi abrupte haltas sur siaj subgenuoj,

ĝin jam baldaŭ lacigas, kaj tiam ĝi ne plu kuraĝas ataki la ĉevalojn aŭ — por uzi la specialan jar-gonon — ĝi rifuzas eniri. Tamen, se ĝi estas fortika, ĝi mortigas kvar aŭ kvin ĉevalojn. La pikadoroj tiam ripozas, kaj oni donas la signalon por pikfiksi la banderillas.

Tio estas bastonetoj de proksimume du futoj kaj duone envolvitaj en ĉirkaŭtranĉita papero kaj finiĝantaj en akra ferpinto dentigita, por ke ĝi restu en la vundo. La ĉuloj tenas unu el tiuj sagoj en ĉiu mano. La maniero plej certa por ilin uzi estas, proksimiĝi mallaŭte post la virbovo kaj subite eksciti ĝin per brua kunfrapado de la banderiloj. La mirigita virbovo turnas sin kaj senhezite salt-atakas sian malamikon. En la momento, kiam ĝi preskaŭ tuŝas lin, kiam ĝi mallevas la kapon por puŝi, la ĉulo enigigas en ĝin la du banderilojn samtempe sur ĉiu flanko de la kolo, kaj tion li nur povas fari, tenante sin dum momento tute proksime kaj kontraŭ la virbovo, preskaŭ inter ĝiaj kornoj, poste li retiriĝas, lasas ĝin pasi kaj rapidas al la barilo, por sin savi. Eta malatento, movo de hezito, aŭ timo sufiĉas por pereigi lin. La spertuloj tamen konsideras la funkciojn de banderillero kiel la malplej dangeŝajn el ĉiuj aliaj. Se li malfeliĉe falas, enigante la banderilojn, li ne klopodas leviĝi, li restas senmove sur la loko, kie li falis. Nur malofte la virbovo puŝas teren, ne pro kompato, sed ĉar atakante ĝi fermas la okulojn kaj superpaŝas la viron, ne vidante lin. Tamen kelkafoje ĝi haltas, flaras lin, kvazaŭ por certigi, ke li estas efektive morta, kaj, malantaŭirante kelkajn paŝojn, ĝi mal-

levas la kapon por lin levi per siaj kornoj; sed tiam la kunuloj de la banderilero ĉirkaŭas kaj okupas ĝin tiel bone, ke ĝi estas devigata, forlasi la supozitan mortinton.

Kiam la virbovo montris senkuraĝecon, t. e. kiam ĝi ne brave ricevis kvar lancobatojn (estas la deviga nombro), la spektatoroj, superegaj juĝantoj, kondamnas ĝin per laŭtkrioj al speco de turmento, kio estas samtempe puno kaj rimedo por veki ĝian koleron. El ĉiuj flankoj eksonas la krio: *fuego!* *fuego!* (fajro! fajro!). Oni tiam disdonas al la ĉuloj, anstataŭ iliaj kutimaj bataliloj, banderilojn, al kiuj estas ligitaj aparatoj pireteknikaj. La pinto estas provizita je meĉaĵo bruligita. Kiam ĝi eniĝas en la haŭton, la meĉaĵo tuŝas la raketon, kiu ekflamiĝas. La flamo profunde brulvundas la virbovon kaj igas ĝin fari saltegojn, kiuj ekstreme amuzas la publikon.

Estas efektive admirinda vidaĵo: tiu grandega besto, ŝaŭmanta pro kolerego, skuanta la flamantajn banderilojn kaj moviĝanta en mezo de fajro kaj fumo.

Spite de la sinjoroj poetoj, mi devas diri, ke el ĉiuj bestoj, kiujn mi observis, neniuj havas tiel multon da esprimo en la okuloj, kiel la virbovo. Oni pli vere diru, neniuj bestoj malpli ŝanĝas sian mienon, ĉar la ĝia estas preskaŭ ĉiam tiu de bruta kaj sovaĝa stupideco. Malofte ĝi esprimas sian doloron per plendoĝemoj: la vundoj ĝin kolerigas aŭ timigas, sed neniam ĝi ŝajnas (permesu al mi tiel paroli) pripensi sian sorton; neniam ĝi ploras kiel cervo. Pro tio ĝi vekas kompaton nur, kiam ĝi igas sin rimarkinda per sia kuraĝo.

Kiam la virbovo portas en la kolo tri aŭ kvar parojn da banderiloj, estas tempo finbatali kun ĝi. Aŭdiĝas tamburado, tuj eliras el la grupo de siaj kamaradoj antaŭe elektita ĉulo; estas la m a t a d o r o. Riĉe vestita, kovrita de oro kaj silko, li tenas longan spadon kaj mantelon skarlatkoloran, ligitan al bastono por povi ĝin pli facile movi. Tion oni nomas la muleta. Li antaŭpaŝas ĝis sub la loĝio de la prezidanto kaj petas kun profunda kliniĝo la permeson, mortigi la virbovon. Estas formalajo, kiu plej ofte okazas nur unu solan fojon por la tuta batalo. Kompreneble la prezidanto ĉiam respondas jese per kapsigno. Tiam la matadoro ekpuŝas hurakrion, faras pirueton, ĵetas teren sian ĉapelon kaj marŝas renkonte al la virbovo.

Ekzistas leĝoj en la virbovaj bataloj same kiel en duelo; ilin ne respekti, estus tiel malglora, kiel mortigi perfide sian kontraŭulon. Ekzemple, la matadoro povas bati la virbovon nur sur la lokon de kuniĝo de l' nuko kun la dorso, kiun la Hispanoj nomas k r u c o. La bato devas esti farata de supre al malsupre, neniam malalte. Milfoje preferinde estus, perdi la vivon ol bati virbovon malalte, flanke aŭ malantaŭe. La spado uzata de la matadoroj estas longa, forta kaj ambaŭflanke tranĉa; la tre mallonga tenilo finiĝas en bulo, kiun oni apogas kontraŭ la manplato. Granda kutimo kaj aparta lerteco estas necesaj por uzi tian batalilon.

Por bone mortigi virbovon, oni bezonas koni fundamente ĝian karakteron. De tiu kono dependas ne nur la gloro, sed la vivo de la matadoro. Estas tiom da karakteroj inter la virbovoj kiel inter la

homoj, tamen ili estas apartigeblaj en du netaj kategorioj: la klaraj kaj la malklaraj. Mi parolas la lingvon de l' cirko. La klaraj atakas malkaŝe, dum ke kontraŭe la malklaraj ruzas kaj klopodas kapti sian homon perfide. Tiuj ĉi lastaj estas tre danĝeraj.

Antaŭ kiam li provas doni al virbovo la mortigan spadobaton, la matadoro prezentas al ĝi la manteleton muleta, incitas ĝin kaj observas atente, ĉu ĝi rekte ĵetegas sin sur la ruĝan tukon, tuj kiam tiu ĉi aperas, aŭ ĉu ĝi malrapide proksimiĝas por malgrandigi la distancon kaj ataki sian kontraŭulon, kiam li ŝajne estas tro malproksima por eviti la puŝegon. Ofte oni vidas virbovon skui la kapon kun minaca mieno, grati la teron per la piedo, ne intencante antaŭenpaŝi, aŭ, eĉ malantaŭen iri malrapide por altiri la viron al la centro de l' areno, kie li ne plu povos forkuri. Aliaj, anstataŭ ataki rektalinie, proksimiĝas per oblikva irado, malvigle, kvazaŭ ili estus lacaj; sed tuj kiam ili mezuris la distancon, ili antaŭensaltas kiel sago.

Por iu, kiu iomete komprenas la arton de la virbova batalo, estas interesa spektaklo, observi la provajn alproksimiĝojn de l' matadoro kaj de l' virbovo, kiuj, kvazaŭ du lertaj generaloj, ŝajnas diveni la intencojn reciprokajn kaj variigas ĉiumomente siajn artifikojn. Kapmovoj, rigardo flanken, malaltiĝanta orelo, jen por sperta matadoro sendubaj signoj pri la projektoj de lia malamiko. Fine la senpacienca virbovo ĵetegas sin kontraŭ la ruĝa tuko, per kiu la matadoro sin protektas. Ĝia vivegeco estas tia, ke ĝi faligus muron per ekpuŝo de siaj

kornoj, sed la viro ĝin evitas per eta movo de l' korpo; li malaperas kvazaŭ mirakle kaj lasas al ĝi nur la malpezan tukajeton, kiun li levas super ĝiaj kornoj, mokante ĝian furiozon. La rapidegeco de la virbovo igas ĝin multe preterpasi sian kontraŭulon; ĝi poste abrupte haltas per rigidigo de siaj kruroj, kaj tiuj subitaj, fortegaj reagoj lacigas ĝin tiom, ke, se tiu agado estus daŭrigata, tio sufiĉus por ĝin mortigi. Pro tio la fama profesoro Romero diris, ke lerta matadoro devas mortigi ok virbovojn per sep spadobatoj. Unu el la ok bestoj mortas pro laceco kaj kolerego.

Post multaj tiaj provoj, kiam la matadoro kredas, ke li sufiĉe bone konas sian antagoniston, li pretiĝas por doni la lastan baton. Firme starante sur siaj kruroj, li metas sin rekte kontraŭ ĝi kaj atendas ĝin senmove je konvena distanco. La dekstra brako kun la spado estas retirita ĝis alteco de la kapo; la maldekstra, streĉita antaŭen, tenas la ruĝan tukon, kiu, preskaŭ tuŝante la teron, instigas la virbovon, mallevi la kapon. Jen la momento por la matadoro, fari la mortigan baton per la tuta forto de sia brako, pliigita per la pezo de sia korpo kaj la puŝado de l' virbovo.

La trifuta spado eniĝas ofte ĝis la mantenilo, kaj se la spadopiko (*estocada*) estas ĝuste direktita, la viro ne plu havas ion por timi: la virbovo haltas tuj, la sango apenaŭ elfluas; ĝi relevas la kapon, ĝiaj kruroj tremas, kaj subite ĝi falas kiel peza maso. Sammomente el la tuta amfiteatro ekbruas surdigaj hura-krioj, svingiĝas poŝtukoj, flugas ĉapeloj en la

arenon, kaj la venkinta heroo modeste sendas manikisojn al ĉiuj flankoj.

En antaŭaj tempoj, oni diras, neniam pli ol unu spadopiko estis necesa; sed ĉio degeneras, kaj nun virbovo malofte falas je la unua bato. Se ĝi ŝajnas mortvundita, la matadoro ne rekomencas. Helpata de la ĉuloj, li igas ĝin rondiri cirkle, ekscitante ĝin per la manteloj por kaŭzi al ĝi kapturnon post malmulta tempo. Kiam ĝi falas, ĉulo senprokraste finas ĝian vivon per ponardpuŝo en la nukon; la besto mortas tuj.

Oni rimarkis, ke preskaŭ ĉiuj virbovoj en la cirklo havas lokon, kien ili ĉiam revenas. Oni nomas ĝin *querencia*. Kutime estas la pordo, tra kiu ili eniris en la arenon.

Ofte oni vidas la virbovon forportanta en la kolo la fatalan spadon, de kiu nur la mantenilo elstaras el la ŝultro. Ĝi transiras la arenon per malrapidaj paŝoj, malzorgante pri la ĉuloj kaj iliaj tukaĵoj, per kiuj ili ĝin persekutas. Ĝi nur deziras oportune morti. Ĝi serĉas sian preferatan lokon, surgenuas, kuŝiĝas, streĉas la kapon kaj mortas trankvile, se ponardopuŝo ne plirapidigas ĝian morton.

Se la virbovo rifuzas ataki, la matadoro kuras al ĝi, kaj ĉiam en la momento, kiam la besto mallevas la kapon, li trapikas ĝin per la spado (*estocada de volopie*); sed se ĝi ne mallevas la kapon aŭ se ĝi ĉiam forkuras, necesas uzi, por ĝin mortigi, tre kruelan rimedon. Viro, armita per longa stango kun tranĉa fero en formo kvaronluna, perfide fortranĉas ĝiajn subgenuojn de malantaŭe, kaj kiam ĝi falas, oni mortigas ĝin per ponardo. Jen la sola

epizodo de tiuj bataloj, kiu al ĉiuj malplaĉas. Estas speco de punmortigo. Feliĉe oni malofte bezonas uzi tiun lastan procedon por mortigi la virbovon.

Trumpetistaro anoncas ĝian morton. Sammomente tri jungitaj muloj eniras trote en la cirkon; ŝnuroj estas fiksataj inter la kornoj de la virbovo, oni alligas hokon, kaj la muloj fortiras ĝin galope. Dum du minutoj la kadavroj de l' ĉevaloj kaj tiu de la virbovo malaperas el la areno.

Ĉiu batalo daŭras proksimume dudek minutojn, kaj ordinare oni mortigas ok virbovojn dum unu posttagmezo. Se la amuzo estis nur mezbona, la prezidanto konsentas pri unu aŭ du pliaj bataloj.

Vi vidas, ke la metio de torero estas sufiĉe danĝera. Mortas mezkvante du aŭ tri el ili dumjare en tuta Hispanujo. Malmultaj atingas grandan maljunecon. Se ili ne mortas en la cirko, ili estas devigataj rezigni pri ĝi antaŭtempe sekve de siaj vundoj. La fama Pepe Illo ricevis dum sia vivo dudek ses kornfrapojn, la lasta mortigis lin. La sufiĉe alta salajro de tiuj homoj ne estas la sola allogo de ilia danĝera metio. La gloro, la aplaŭdoj ilin instigas maltimi la morton. Triumfi antaŭ kvin aŭ ses mil personoj estas tiom dolĉe! Pro tio ne malofte oni vidas altrangajn amatorojn partopreni en la danĝeroj kaj gloroj de la toreroj profesiaj. En Sevilla mi vidis markizon kaj grafon plenumi en publika spektaklo la funkciojn de pikadoroj.

Tamen la publiko ne estas indulgema kontraŭ la toreadoroj. La plej eta montro de timemo estas punata de mokokrioj kaj sibloj. Pluvas el ĉie la plej abomenaj insultoj, eĉ kelkafoje laŭ ordono de la po-

polo; kaj jen la plej terura pruvo de ĝia indigno: alguazilo iras al la toreadoro kaj trudas al li la devon, ataki tuj la virbovon sub la minaco de malliberejo.

Iun tagon la aktoro Majquez, indigne vidante matadoron heziti antaŭ tre malhela virbovo, surŝutis lin je insultoj. — “Sinjoro Majquez”, diris la matadoro, “vidu, tie ĉi ne temas pri mensogoj, kiel sur via scenejo.”

La aplaŭdoj kaj la ambicio, havigi al si famon aŭ konservi tiun, kiun ili jam akiris, devigas la toreadorojn, pligrandigi ankoraŭ la danĝerojn, al kiuj ili jam estas elmetitaj: Pepe Illo kaj poste Romero iris renkonte al la virbovo kun ĉenoj ĉirkaŭ la piedoj. La sinregado de tiuj homoj en la plej premantaj danĝeroj estas kvazaŭ mirakla. Pikadoro Francisco Sevilla estis renversita de sia ĉevalo per andaluza virbovo eksterordinare forta kaj facilmova. Tiu virbovo, anstataŭ lasi sin distri per la ĉuloj, sin turnis obstinege al la viro, piedpremante lin kaj faris al li multajn kornbatojn en la krurojn, sed rimarkinte, ke ili estas tro bone ŝirmataj per la leda kaj ferumita pantalono, ĝi turniĝis kaj mallevis la kapon por enpuŝi siajn kornojn en la bruston. Tiam Sevilla, per senespera penado levetante sin, kaptas la virbovon ĉe la orelo per unu mano kaj enkreĉas la fingrojn de la aliaj en la naztruojn, dum li tenas sian kapon kvazaŭ gluita sub tiun de la furioza besto. Vane la virbovo lin skuegis, lin piedpremis, lin jetis teren, neniam ĝi sukcesis igi lin forigi la fingrojn. Kun korpremo ni rigardadis tiun malegalkan luktadon. Ĝi estis la agonio de bravulo; oni povis

nek krei, nek spiri, nek deturni la okulojn de tiu teruriga sceno. Ĝi daŭris preskaŭ du minutojn. Fine la virbovo, venkita per la viro en tiu lukto, forlasis lin por persekuti la ĉulojn. La tuta rigardantaro kredis, ke Sevilla estos forportata el la areno. Oni starigas lin; kiam li estas surpiede, li tuj ekkaptas ruĝan mantelon, malgraŭ la pezaj botoj kaj la maloportuna krurŝirmilo. Oni devis forŝiri de li la mantelon el la manoj, alie li certe estus mortigita tiun ĉi fojon. Oni kondukas al li ĉevalon; li surĵetas sin, bolante pro kolero, kaj atakas la virbovon en mezo de la cirko. La interpuŝo de tiuj du bravegaj kontraŭuloj estis tiel fortega, ke ambaŭ, ĉevalo kaj virbovo, falis sur la genuojn. Ho! Se vi estus aŭdintaj la hura-kriojn! Se vi estus vidintaj la frenezajn ĝojon, la specon de ebrieco de l' homamaso, vidante tiom da kuraĝo kaj da sukceso, vi estus enviintaj kiel mi la sorton de Sevilla! Tiu viro fariĝis senmorta en Madrid.

Biblioteko Tutmonda

Titolaro de la tri unuaj serioj

(Sangoj estas rezervitaj)

Serio Ia: Mérimée, Mateo Falcone kaj aliaj rakontoj. El la Franca tradukis Borel. — Van Eeden, La Malgranda Johano. El la Nederlanda tradukis Bultuis (3 n-oj). — Baudouin, La Arto de Memdisciplino (Psikagogio). Originalo. — Karinty, Norda Vento (Novelkolekto). El la Hungara tradukis Bodó. — Inglada, La Sismologio (tertemoj, vulkanoj). Originalo (2 n-oj). Bratescu-Voinesti, Niĉjo Mensogulo kaj aliaj noveloj. El la Rumana tradukis Morariu. — Penndorf, El Grekaj Papirusoj. Originalo.


Serio IIa: La Aventuroj de Munchhausen. El la Angla tradukis Applebaum (2 n-oj). — Puŝkin, Kapitana-filino. El la Rusa tradukis Sidlovskaja (2 n-oj). — Collinson, La Homa Lingvo. Originalo. — Korčak: Rakontoj Humoraj. El la Pola tradukis Weinstein. — Bujwid, Higiena Vivado. Originalo. — Babits, La Cikoni-kalifo. El la Hungara tradukis Bodó (2 n-oj). — Bovet, La instinktoj de la infanoj kaj ilia valoro por la edukado. Originalo.

Serio IIIa: Kamaryt, Kemio en la hejmo. Originalo (2 n-oj). — Korolenko, La Sango de Makaro. El la Rusa tradukis Sidlovskaja. — Kenn, La Penso de Konfucio. Originalo. — Konstantinov, Elektitaj Felietonoj kaj Rakontoj. El la Bulgara tradukis Krestanoff. — Por la ceteraj kvin numeroj la temoj ankoraŭ ne estas definitive elektitaj.

RUDOLF MOSSE / ESPERANTO-FAKO

Jerusalem Strasse 46—49

BERLIN SW 19 (GERM.)



Biblioteca Juveniles

(Notas de la Biblioteca)

En la Biblioteca de la Universidad de la Habana, se encuentra un ejemplar de la obra de don Juan de los Rios, titulada "Historia de la literatura de la lengua castellana", publicada en Madrid en 1845. Este libro es una obra importante para el estudio de la literatura española, ya que recoge y analiza la producción literaria de la lengua castellana desde sus orígenes hasta el siglo XVIII. El autor, don Juan de los Rios, es un destacado filólogo y escritor español, conocido por sus trabajos sobre la historia de la lengua y la literatura. La obra está organizada en tomos, lo que facilita su consulta y estudio. Este ejemplar, perteneciente a la Biblioteca de la Universidad de la Habana, es un valioso recurso para los investigadores y estudiantes interesados en la literatura española.

EDICIÓN DE DON JUAN DE LOS RIOS

Imprenta de don Juan de los Rios
En la Habana, 1845



Książnica Podlaska
im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku



000678369